tejo

# JARRAPORTO

## KALENDARA JARO **2020**

**Tutmonda Esperantista Junulara Organizo**

Nieuwe Binnenweg 176
3015 BJ Rotterdam
Nederlando
www.tejo.org

Esperantujo, la 30-a de junio 2021

Ĉefkompilita de:

Paulína Jalakšová, *Subvencipetisto*

Eroj verkita de:

Albert Stalin Tancinco Garrido, *eksa Komisiito pri Landa Agado en Azio (2019-2020), poste Estrarano pri Landa kaj Faka Agado (2020-2021)*

Ana Ribeiro, *Komisiito pri UNOY*

Ariel Palmer, *Oficisto pri Komunikado*

Briac Millon (Brijako), *Komisiito pri Adoleska Agado*

Carlos Pesquera Alonso (Karlos'), *Vicprezidanto (2020-2021)*

Charlotte Scherping Larsson, *Prezidanto de TEJO (2020-2021)*

David Ruíz i Sánchez, *Komisiito pri branĉo Liberen*

Euleax de Lima Pereira, *Komisiito pri Egaleco (ekde Septembro 2020)*

Hans Eric Becklin (Hanso), *Komisiito pri Kulturo*

Karina Oliveira, *Estrarano (2019-2021)*

Klára Ertl, *Estrarano (2020-21)*

Konstanze Schönfeld (Tuŝka), *Ĝenerala Sekretario (2020-2021)*

Łukasz Żebrowski, *Membro de la Elekta Komisiono (2019-2020)*

Manuela Burghelea, *Komisiito pri Universitata Agado*

Marc Konijnenberg (Marko), *Komitatano A (Nederlando)*

Marcionilo Vasconcelos, *Redaktoro de Movada Rubriko*

Mia Nordentoft, *Oficisto pri AKSO kaj Teĥniko*

Michael Boris Mandirola, *Membro de la Elekta Komisiono (2020-2021), Komisiito pri aktivula trejnado*

Michael Vrazitulis, *Komisiito pri UNITED (ekde oktobro 2020)*

Mung Bui (Feliĉa), *Kasisto*

Nicolas Kasolene (Nickson), *Komisiito pri Talento (ekde sep. 2020)*

Paulína Jalakšová, *Subvencipetisto*

Quentin Auduc, *Volontulo en CO per EKC (julio - septembro 2020)*

Rakoen Maertens, *Komisiito pri KER-agado ĉe UN kaj Unesko*

Raoni Sousa, *Komisiito pri Edukado*

Renato Guedes Filho, *Volontulo en CO per ESK (ekde septembro 2020)*

Rogener Pavinski, *Redaktoro de Kontakto*

Rogier Huurman (Roĉjo), *Membro de la LKK de IJK 2020, poste Estrarano (2020-21)*

Snehaja Venkatesh, *Komisiito pri Scienco*

Soraya Alvarez, *Komisiito pri Alireblo*

Spyros Papadatos, *Oficisto pri Eksteraj Rilatoj*

Tomáš Stano, *Vickomisiito pri Aktivula Trejnado (2019-2020), poste Vicprezidanto (2020-2021)*

Valentin Ceretto Bergerat, *Volontulo en CO per ESK (ekde aŭgusto 2020)*

Provlegita de:

Hans Eric Becklin (Hanso), *Komisiito pri Kulturo*

Konstanze Schönfeld (Tuŝka), *Ĝenerala Sekretario (2020-2021)*

Valentin Ceretto Bergerat, *Volontulo en CO per ESK (ekde aŭgusto 2020)*

# Enhavlisto

**Enkonduko** 5

**Parto 1: Funkciado** 6

Administrado 6

Balotado por la nova estraro 6

Cirkulero 6

Elekta Komisiono 2019-2020 6

Elekta Komisiono 2020-2021 8

Kunlaborplatformo 8

Voĉdona sistemo 8

Komitato 8

Komitatkunsidoj 8

Realigplano 8

Statuto kaj reglamento 9

**Financoj** 9

**Oficistoj** 9

Dungoj 9

Ariel Palmer 10

Mia Nordentoft 12

Paulína Jalakšová 16

Spyros Papadatos 17

**Volontuloj** 19

Loĝado kaj laborkondiĉoj 19

Alvoko kaj elektoj 20

Valentin Ceretto Bergerat 20

Renato Guedes Filho 21

Quentin Auduc 22

**Rilatoj kun UEA** 22

**Rilatoj kun Patronoj** 23

**Parto 2: Komisionoj** 24

**Aktivula trejnado** 24

**Kongresoj** 24

JES 2020/2021 24

IJK 2020 25

Partoprenu IJK-n 2020 25

Preparado de IJK 2021 26

**Eksteraj rilatoj** 26

UNITED 26

UN & Unesko 27

UNOY 27
Forumo Junulara Eŭropa 27
**Landa kaj faka agado 28**
Afriko 29
Azio 29
Eŭropo 30
**Merkatiko kaj informado 30**
Merkatiko 30
Retpaĝo 30
Kontakto 31
Movada Rubriko 31
TEJO-aktuale 32
**Projektoj 33**
Projektoj kun Konsilio de Eŭropo (KdE) (2019-2020) 33
**Talento 34**
**Parto 3: Interesgrupoj kaj aliaj servoj 35**
Adoleska Agado 35
Egaleco 35
Genra Egaleco 35
Tutmonda Egaleco 36
Alireblo 36
Liberen 36
Junaj Amikoj de Esperanto 37
Kongresoj 37
Pasporta Servo 37
Edukado, Scienco kaj Kulturo 37
Edukado 38
Scienco 38
Kulturo 39
Universitata Agado 40
Malaktivaj komisionoj kaj laborgrupoj 40
**Apendico 41**
Kromnomoj de personaj nomoj 41
Mallongigoj de nomoj de organizoj kaj organoj 41

# Enkonduko

2020, kiel malfacila jaro! Kiam la jaro komenciĝis ni estis plenaj je espero, sed pro la influo de la pandemio multo ŝanĝiĝis. Mi pensas pri tiuj, kiujn ni perdis dum la jaro.

Eventoj nuliĝis, volontuloj kaj aktivuloj devis haltigi siajn vojaĝojn aŭ dum malcertaj cirkonstancoj reveni al siaj loĝlandoj.

Nederlanda Esperantista Junularo antaŭĝojis finfine organizi la Internacian Junularan Kongreson - ĉu vi memoras la batalon kun la slovakoj? Anstataŭ renkontiĝi surloke en Nederlando, la teamo en malmulte da tempo organizis la unuan retan IJKn. La reta evento inspiris nian agadon por la estonteco kaj montras kiel ni devas ŝanĝi nian agadon por rete kunigi nian tutmondan aktivularon. La evento estis elstare tutmonda kaj ni jam vidas pli da ekstereŭropaj aktivuloj en niaj komisionoj. Nun pli da aktiveco en la komisionoj estas organizita rete, en babilejoj kaj retaj kunvenoj.

Mi volas bonvenigi nian novan landan sekcion - JETO, junulara landa sekcio de Tanzanio.

Kio pli okazis dum la jaro? Nu, la specifaj detaloj pri tio atendas vin en la jarraporto de la jaro 2020.

Ĝuu la legadon!

Charlotte Scherping Larsson
Prezidanto de TEJO



# Parto 1: Funkciado

## Administrado

*raportas Paulína Jalakšová, Subvencipetisto, kaj Konstanze Schönfeld (Tuŝka), Ĝenerala Sekretario (2020-2021)*

### Balotado por la nova estraro

La estraro estas la ĉefa plenuma instanco de la organizo. Dum la periodo 2020–2021 la estraranoj, elektitaj de la Komitato de TEJO la 15-an de julio 2020 rete estas:

- Charlotte Scherping Larsson – Prezidanto;
- Carlos Pesquera Alonso (Karlos') – Vicprezidanto;
- Tomáš Stano – Vicprezidanto;
- Konstanze Schönfeld (Tuŝka) – Ĝenerala Sekretario;
- Mung Bui (Feliĉa) – Kasisto;
- Karina Oliveira – Estrarano;
- Klára Ertl – Estrarano;
- Rogier Huurman (Roĉjo) – Estrarano;
- Robert Nielsen – Estrarano, ĝis la 10-a de Novembro 2020.

La 29-an de novembro, 2020, post la demisio de Robert, estis elektita:

- Albert Stalin Tancinco Garrido, Estrarano.

### Cirkulero

La aktivuloj de TEJO – estraranoj, komitatanoj, komisiitoj, volontuloj kaj oficistoj – regule raportas pri sia agado publike. Iliaj raportoj aperas kiel monata cirkulero dissendata pere de la komitata diskutlisto. Ĉiuj arkivaj numeroj de 2020 estas legeblaj en Centra Reto.

### Elekta Komisiono 2019-2020

*raportas Łukasz Żebrowski, Membro de la Elekta Komisiono (2019-2020)*

La Elekta Komisiono mem esti elektita kun plurmonata malfruo. Ĉefkaŭzis tion decido de la Komitato ne nomumi la membrojn dumkongrese, tuj post elekto de la estraro, kaj duavice problemoj de la tiama Ĝenerala Sekretario. Estas nepre, ke la Komitato nomumu la membrojn de la Elekta Komisiono laŭreglamente, tuj post elekto de nova estraro, ĉar alie

povas estiĝi aparte danĝera situacio en kiu nove elektita estraro parte aŭ plene ĉesas funkcii kaj samtempe mankas laŭreglamenta organo, kiu povus agi por solvi la problemon.

Fine, la Elekta Komisiono estis elektita la 16-an de decembro 2019 en la jena konsisto: Hans Becklin, Oleksandra "Sasha Murr" Kovyazina, Francesco Maurelli, Ana Ribeiro, Łukasz Żebrowski.

La teamo eklaboris tuj post elektiĝo okupiĝante unuavice pri aferoj rilataj al neceso havi novan Ĝeneralan Sekretarion pro demisio de Catherine NEILSON. La Komisiono konsilis tiurilate al la Estraro, kiu - sekvante la rekomendon - tuj proponis taŭgan kandidaton, kiu plej rapide kaj glate eniru la teamon kaj eklaboru. La komitato aprobis ĉi tiun proponon kaj elektis Querino Neto kiel novan Ĝeneralan Sekretarion.

Sekvaj taskoj de la Komisiono denove rilatis al la tiama estraro. Temis pri kompletigo de la estraro post eksestraraniĝo de Hoan Tran (Ĝojo). Detaloj pri ĉi tiu elektoprocezo estis prezentitaj en la *raporto Elekta Komisiono 2020-02*. Kongrue kun la rekomendo de la Elekta Komisiono al la posteno estis elektita Soraya Alvarez. Samtempe, la Elekta Komisiono invitis la estraron kontaktiĝi kun la neelektitaj kandidatoj kaj proponi iun kunlaboreblon (kune kun specifaj proponoj de la Komisiono).

Pli detale pri laboro de la Elekta Komisiono en ĉi tiu periodo eblas legi en la *Raporto Elekta Komisiono 2020-04*.

Rilate al la estrarelekto por la oficperiodo 2020-2021 la Elekta Komisiono serĉis kandidatojn al la estraro pere de malferma alvoko kaj ankaŭ persone kontaktante diversajn aktivulojn, kiujn konis membroj de la komisiono mem aŭ kiuj estis rekomenditaj de aliaj homoj. Sume ni interparolis kun pli ol trideko da TEJO-aktivuloj. El tio rezultis 13 kandidatiĝoj de personoj el 5 kontinentoj. Sep el la kandidatoj estas virinoj, 6 estas viroj. Pliajn detalojn pri tio eblas legi en la *Fina raporto de la Elekta Komisiono. Elekto de estraro por la mandato 2020-2021*.

Krom la raporto, la Elekta Komisiono kolektis demandojn al la kandidatoj kaj petis ilin respondi forme de filmeto aŭ mesaĝo, kaj aldone okazigis retan debaton inter la kandidatoj por prezidanteco. Pro la malfacila situacio en la tiama Estraro kaj laŭ la peto de la tiama Estraro la Elekta Komisiono esceptokaze ankaŭ aparte engaĝiĝis en la organizado de la reta komitatkunsido kaj ties voĉdonoj.

Post la komitatkunsido ni ankoraŭ kunsidis kun membroj de la novelektita Elekta Komisiono, transdonis al la nova Estraro informojn pri homoj, kiuj esprimis emon aktivi en TEJO kaj dum kelka tempo estis en kontakto kun membroj de la nova Estraro.

Pli detalaj informoj pri agado de la Elekta Komisiono kaj ties membroj troveblas en ĉi-supre menciitaj raportoj kaj ankaŭ en ĉiuj cirkuleroj de la koncerna periodo (175-183).

## Elekta Komisiono 2020-2021

*raportas Michael Boris Mandirola, Membro de la Elekta Komisiono (2020-2021)*

En julio la Komitato elektis novan Elektan Komisionon, kiu konsistas el Charlotte Burton, Michael Boris Mandirola, Vít Guiglielmo Míšurec kaj Tamiris Maciel Queiroz.

La Elekta Komisiono aktiviĝis en novembro kiam, pro la demisio de Robert Nielsen, necesis elekti novan estraron pri landa agado. La Elekta Komisiono kontaktis 4 kandidatojn kiujn indikis la TEJO-Estraro; du el ili akceptis kaj fine estis elektita Albert Stalin Tancinco Garrido, kongrue kun la rekomendo de la Elekta Komisiono.

## Kunlaborplatformo

La Centra Reto estas la platformo uzata de TEJO aktivuloj por raporti pri sia agado pere de aŭtomata sistemo.

## Voĉdona sistemo

Dum 2020 la sistemo estis plurfoje plibonigita kaj pretiga por la Komitatkunsido okazinta en Julio 2020 dum la reta IJK 2020.

## Komitato

Ĝisdatiĝoj pri la renovigo de la Komitato troviĝas ĉi tie.

## Komitatkunsidoj

La Komitato en 2020 kunvenis la unuan fojon nur rete. Okazis du Komitatkunsidoj:

- en julio dum IJK 2020 (malnova mandato);
- en novembro (nova mandato).

Ambaŭkaze, rolis kiel kunsidestro Francesco Maurelli.

## Realigplano

Laboroj por verki novan realigplanon komenciĝis en septembro 2020, dum ĉeesta EstrarKunsido en Roterdamo, kaj finiĝis kun la lasta sesio de la KomitatKunsido dum fino de novembro 2020. La realigplano estis aprobita de la Komitato dumkunvene kaj disponeblas publike en la retejo de TEJO. Male ol en la antaŭaj jaroj, la Realigplano estis verkita laŭ la estrara, mandata jaro (ekde septembro ĝis aŭgusto) kaj ne laŭ la kalendara jaro. Al la Realigplano kontribuis ne nur estraranoj, sed ĉiuj oficistoj, volontuloj, kaj signifa komisionaro.

### Statuto kaj reglamento

Reglamentŝanĝoj post la elektiĝo de la nova estraro okazis dumkomitatkunside kaj videblas en la protokolo de la Reta Komitatkunsido 2020-11.

## Financoj

*raportas Mung Bui (Feliĉa), Kasisto (2017-2021)*

En Julia komitata kunsido mi estis denove elektita kiel kasisto por mia kvara mandato en la TEJO-estraro. Mi daŭre prilaboras la kutimajn taskojn de kasisto: zorgi pri buĝetado, financa raportado, librotenado; kontroli, aprobi kaj repagi kostojn al membroj, volontuloj kaj oficistoj, kaj kostojn en la CO, TEJO-apartamento kaj Volontula Domo (VolDom); kaj sekvi alvenon kaj uzon de subvencioj kaj donacoj.

En 2020 la ĉefaj enspezoj de TEJO venis de subvencioj (ESK-subvencio, EACEA-subvencio), membrokotizoj, subtenoj de kundungoj de oficistoj. En 2020 ni sukcese petis de la ESK-programo subvencion por 3 volontuloj, kaj de EACEA administran subvencion por 5 kunsidoj kaj 3,5 oficistoj kun la sumo 50,000 EUR. Ni ricevis 80% de la subvencio dum la jaro, kaj post aprobo de la fina raporto estis ricevontaj la ceteron. La du subvencioj helpas kovri parton de la kostoj de volontuloj, oficistaj salajroj, kaj estrarkunsidoj. La finaj sumoj de la subvencioj estos informitaj post la aprobo de fina raporto. Krome, en 2020, ni ne povus vojaĝi pro COVID-19, do kostoj de estraro/volontuloj/KER-aktivuloj malaltiĝas, sed pro nuligo de fizika IJK en Nederlando, ni perdis la kaŭcional la kongresejo (ĉ.6000 EUR). Detalo pri aktivo/kapitalo/spezo de TEJO aperas en financa raporto 2020 ĉi tie.

## Oficistoj

*raportas Mung Bui (Feliĉa), Kasisto (2017-2021)*

### Dungoj

Superrigaro pri dungoj en 2020:

- Giorgio Nikolov (Ariel) – Oficisto pri Komunikado (tutjare)
- Paulína Jalakšová – duontempa Oficisto pri Subvencioj (tutjare)
- Saïd Balouchi – 82,5%-tempa Kunordiganto de CO-Volontuloj; Oficisto de UEA kaj TEJO (tutjare)
- Spyridos Papadatos – plentempa Oficisto pri Eksteraj Rilatoj de UEA kaj TEJO (tutjare)
- Mia Nordentoft – plentempa Oficisto pri AKSO (tutjare)

Dum la jaro TEJO dungis entute 5 oficistojn por 5 postenoj. Ĉiuj oficistoj restis de antaŭaj jaroj kaj laboras por TEJO laŭ daŭraj kontraktoj. Krome, por plenumi la kontrakton kun UEA pri la AKSO-projekto, de oktobro 2019 ni dungis la eksan volontulon Mia Nordentoft por daŭrigi la laboron de tiu projekto. La plulaboro de Mia estis financita de la kontrakto kun UEA pri AKSO.

## Ariel Palmer

*raportas Ariel Palmer, Oficisto pri Komunikado (ekde 2017)*

### Enhavoj kaj agado

2020 estis jaro ofte nomata "senprecedenca", pro kialoj kiujn ni ĉiuj bone konas. Do, senprecedenca jaro postulas senprecedencan agadon. Dekomunika vidpunkto, TEJO engaĝis sian komunumon kiel neniam antaŭe: distance sed efike. Ni celis videbligi junajn esperantistojn kaj krei eblojn por ke ili interkonatiĝu.

Ni decidis multe plifortigi nian agadon rilate al videoj. Dum la pasintaj jaroj jam estis evidente ke homoj en nia komunumo tre bone respondas al bonkvalitaj filmetoj, kaj ni jam konis la povonde videomaterialo por montri la vizaĝojn kaj plilaŭtigi la voĉojn de junaj esperantistoj. La agado de TEJO rilate al komunikado ĉefe fokusiĝis pri tio: en 2020 mi kreis 21 videojn.

Ni kreis serion de videoj nomata "Esperantistoj kaj kronviruso", kun kontribuoj de junaj esperantistoj de ĉiuj partoj de la mondo. Mi kreis alvokojn, kolektis materialojn kaj interagis kun la kontribuantoj, muntis kaj varbis la diversajn epizodojn de la serio. Ĉiu epizodo de la serio postulis sufiĉe multe da laboro.

La 6 epizodoj estas disponeblaj en YouTube kaj ankaŭ en Facebook kaj ili jam estis spektitaj entute ĉirkaŭ 30 mil foje. Ili estis kunhavigitaj centoj da fojoj, instigis multajn debatojn kaj klare montris kiom vigla la junulara Esperanto-movado estas.

Longa kaj grava laboro estis la video "La vivo de la TEJO-volontuloj en Roterdamo". La filmeto utilis por montri la agadon kaj gravecon de TEJO-volontulado. Mi filmis ĝin en Roterdamo en 2019 sed muntis kaj publikigis ĝin en majo 2020. La video sekvis striktan scenaron(verkitan de mi kune kun la volontuloj), kaj postulis longan muntadon pro la granda kvanto da materialo kaj informoj, kiujn ĝi enhavas.

La video Kiel ni organizis la Internacian Junularan Kongreson (kiu estas preskaŭ filmo, 26 minuta), kolektas spertojn kaj konsilojn de la organizantoj de IJK 2019 en Slovakio, utilajn por montri la laboron malantaŭ la organizado de la IJK kaj por inspiri kaj helpi estontajn organizantojn.

Aŭguste mi kreis la videon Novaj Esperantistoj: La Duolingo-Generacio kiu montras plurajn esperantistojn kiuj lernis Esperanton pere de Duolingo donante konsilojn pri lingvolernado kaj engaĝiĝo en la komunumo.

Ni publikigis ankaŭ du videojn faritajn kun la TEJO-estrarano Karina Oliveira, registritaj pasintjare sed uzitaj en 2020: Konsiloj pri lingvolernado kaj Lerni Esperanton per Duolingo. Ambaŭ videoj estis tre bone taksitaj de la spektantaro.

Januare, kiam ankoraŭ neniu imagis ke IJK ne okazos ĉeeste, mi kreis videon por la konkurso Partoprenu IJKn.

Mi kreis 3 videojn por IJK2020: varbfilmeto, video por la oficiala malfermo (ambaŭ kun kontribuoj senditaj de homoj), kaj video por la fermo kun kunmetaĵo de plej bonaj momentoj de la IJK.

Ekde oktobro ekis la novaĵserio de TEJO "Enmovade", en kiu TEJO-estraranoj kaj aktivuloj de la tuta mondo rakontas pri sia agado kaj kunhavigas spertojn kaj ideojn. Ĝis nun ni realigis 2 epizodojn - la oktobran kaj la novembran.

Mi kreis du videojn pri Esperanto kaj Scienco (epizodo 1 kaj epizodo 2), en kiuj multaj esperantistoj rakontis pri sia fako - la videoj estis faritaj kun la Komisiono de TEJO pri Scienco.

Mi faris la videon Esploristoj pri Esperanto en kiu esploristoj el diversaj mondopartoj parolas pri siaj fakoj kaj malkovroj - video farita kun la komisiono pri Universitata Agado.

Decembre mi kreis la Zamenhoftagan videon kun ĉirkaŭ 50 kontribuoj el la tuta mondo. La laboro pri la video estis vere longa kaj intensa (interago kun kontribuantoj, kolekto de materialo, adapto de la materialo, kreado duoblaj fiksitaj subtekstoj, muntado, ktp.)

Varbado pri la videoj estis diversa. Kelkaj videoj estis alŝutitaj nur al YouTube, aliaj al YouTube kaj Facebook, aliaj al YouTube, Facebook kaj Instagram. Por la plejmulto de la videoj, krom la video mem, mi kreis t.n. "teaser" por Instagram (mallonga kunmetaĵo de momentoj de la video por instigi spektadon en alia platformo, ĉefe YouTube).

Kiel jam en la antaŭaj jaroj, krom videoj, mi kreis enhavojn kiel starigon de demandoj kaj diskutoj, ktp. kaj aktive kunhavigis kaj helpis disvastigi enhavojn jam kreitajn de homoj en la Esperanto-komunumo.

Daŭris kompreneble ankaŭ la kutimaj instituciaj TEJO-enhavoj kiel informoj, alvokoj, varbado pri aktivaĵoj ktp. Kiel kutime, mi faris diversajn grafikaĵojn dum la jaro laŭ petoj de la estraro. En tejo.org mi kreis alvokojn kaj artikolojn, kaj aldonis paĝojn kaj informojn pri aktivaĵoj kaj helpis varbi por ili. Pro la fokusiĝo pri videoj, ĉi-jare mi faris malmultege da citaĵo-bildoj kaj gramatikaĵoj.

Aldone, parto de mia laboro por TEJO estas ankaŭ interagi kun uzantoj en sociaj retejoj, respondi al demandoj, varbi kaj kuraĝigi homojn partopreni en la aktivaĵoj de TEJO. Mi varbis por IJK 2020 per afiŝoj, memorigoj, grafikaĵoj ktp.

Mi verkis proponojn por nova Komunika plano kiun mi prezentis al la nova estraro.

Rilate al grafikaĵoj, marte, je la komenco de la pandemio, mi kreis serion de 31 plurlingvaj bildoj libere uzeblaj, por instigi lernadon de Esperanto dum hejma restado. La bildoj estis granda sukceso kaj estis kunhavigitaj centojn da fojoj kaj uzitaj de multaj lokaj Esperanto-asocioj.

Mi okupiĝis pri la komunika identeco de IJK 2021 (logotipo, grafikaĵoj, bildoj, ktp). Mi kunsidis kun la teamo kaj mi kreis diversajn proponojn.

Mi kolektis de E@I kaj reorganizis la registraĵojn de programeroj de IJK2020 por publikigo en la YouTube kanalo de TEJO.

Dum la jaro mi faris plurfoje kampanjetojn en Instagramo por interkonatiĝo de esperantistoj, kiu estas alia bonega maniero por videbligi junajn esperantistojn kaj konekti ilin unu al la aliaj.

## Atingoj

Ĉiuj komunikaj atingoj de TEJO dum 2020 estis pli altaj ol tiuj de la pasintaj 4 jaroj. Dum la jaro ni akiris1100 novajn sekvantojn en Facebook, en Instagram pli ol 700, en Twitter pli ol 550. Tamen, la plej bona atingo estas la kresko en nia YouTube-kanalo: pli ol 1500 novaj abonantoj. Tio ebligis al nia kanalo atingi pli ol 110 mil spektojn sume

## Kunlaboro kun la estraro

Mia kunlaboro kun la estraro dum 2020 estis pozitiva. Dum la unua parto de la jaro, kun la estraro 2019-2020, mi kunlaboris ĉefe kun Karina. Ŝi estis la homo kun kiu mi plej ofte pridiskutis ideojn, taskojn kaj farendaĵojn. Ŝi havis la ideon eki la serion Esperantistoj kaj Kronviruso kaj estis kerna parto en la disvolviĝo de TEJO-komunikado. Mi havis malfacilaĵojn rilate al problemoj de nia retejo, kiujn mi ne povis mem korekti, kaj iomete suferis pro manko de teknika helpo, superrigardo kaj transpreno de praktikaĵoj.

Mi estis vere surprizita pri la nova estraro 2020-2021, pri ĝia engaĝiĝo kaj entuziasmo. Tuj ekde la komenco de ĝia mandato, mi rimarkis fortan kaj belan envolviĝon. Tio multe inspiras min. Mi havas sufiĉe oftajn kontaktojn kun la plejmulto de la novaj estraranoj kaj mi vere aprezas tion ĉar estas bela interŝanĝo de ideoj kaj reciproka subteno, aparte bezonata en malfacila tempo kiel la nuna.

# Mia Nordentoft

*raportas Mia Nordentoft, Oficisto pri AKSO kaj Teĥniko (ekde novembro 2019)*

La projekto AKSO – Administra Komuna Sistemo Organiza – estis komencita dum mi estis volontulo de TEJO en 2018/2019, kaj mi estis dungita kiel oficisto de TEJO fine de 2019 por daŭrigi kaj finfari tion, kion mi komencis kunlabore kun aliaj aktivuloj de TEJO kaj UEA. Dum la jaro 2020 mi daŭrigis tiun laboron.

AKSO estas projekto komencita de UEA, kontrakte plenumata de TEJO, kiu celas renovigi la retajn servojn de TEJO kaj UEA, kiel tejo.org, uea.org, la membrospacon ĉe uea.org, la administran sistemon uzatan de la oficistoj de UEA, kaj similajn. La projekton oni ree interkonsentis fine de 2018, kaj mi volontule ekkreis la sistemojn komence de 2019.

Nuntempe laboras pri AKSO flanke de TEJO: Mia Nordentoft, ĉefprogramisto; Vincent Chimin Brandt, programisto; Francesco Maurelli, konsulta komisiito.

La progreson pri AKSO ĉiam estas rete kontrolebla ĉe akso.org. Ĝis la fino de 2019 estis farita la jena progreso:

**Januaro 2020**

- Aldonis administrajn grupojn al AKSO Admin
- Aldonis permesredaktilon al AKSO Admin
- Aldonis mastrumadon de API-klientoj al AKSO Admin

- Aldonis land(ar)ojn al AKSO Admin
- Daŭre laboris pri aliĝila sistemo por kongresoj en API
- Plibonigis retpoŝtŝablonojn, renomis al sciigŝablonoj en API
- Plibonigis mastrumadon de permesoj ĉe administraj grupoj, klientoj kaj membroj en API
- Kreis fundamenton de la nova UEA.org

**Februaro 2020**

- Plibonigis permesredaktilon en AKSO Admin
- Aldonis membrolistojn al AKSO Admin
- Plibonigis diversajn aferojn rilate al interna administrado en AKSO Admin
- Eklaboris pri voĉdonado en AKSO Admin
- Ekkreis la stilon de la nova UEA.org
- Kreis diversajn fundamentojn funkciojn por UEA.org
- Pli da laboro pri aliĝiloj por kongresoj en API
- Riparis diversajn cimojn en API

**Marto 2020**

- Riparis amason de cimoj en AKSO Admin
- Pli da laboro pri aliĝiloj por kongresoj en API
- Eklaboris pri la nova aŭtomata pagsistemo
- Riparis diversajn cimojn pri voĉdonado en API
- Aldonis voĉdonŝablonojn al API

**Aprilo 2020**

- Eklaboris pri konekto inter AKSO kaj la nova UEA.org
- Ekkreis redaktilon por AKSO-Skripto por AKSO Admin
- Daŭre laboris pri nova aŭtomata pagsistemo
- Plibonigis membrolistojn en API
- Aldonis taskmastrumadon al API

**Majo 2020**

- Diversaj etaj plibonigoj kaj riparoj de cimoj
- Plibonigis la redaktilon pri permesoj de administraj uzantoj
- Kreis interfacon por mastrumado de AKSO-Pago (mankas enspezraporto)
- Plibonigis la uzadon de multaj paĝoj por poŝtelefonaj uzantoj
- Aldonis frontpaĝon kun helpo kaj taskosuperrigardo
- Aldonis taskojn al la menuo

- Eklaboris pri po-revua alirmastrumado
- Eklaboris pri simplaj abonoj de revuoj
- Riparis cimojn pri taskoj
- Riparis diversajn cimojn pri AKSO-Pago
- Aldonis diversajn mankantajn funkcietojn al AKSO-Pago
- Riparis kelkajn cimojn pri forigo de datumoj

**Junio 2020**

- Aldonis sistemon por mastrumado de roloj
- Aldonis sistemon por mastrumado de membreckategorioj
- Aldonis facadon por financaj raportoj de AKSO-Pago
- Aldonis ŝablonojn al generado de adresetikedoj
- Plibonigis la redaktilon de horoj kaj plibonigis la redaktilon de tagoj
- Riparis diversajn cimojn pri membrorestriktoj
- Aldonis listordigadajn sagojn al la supro de la listoj
- Riparis diversajn cimojn pri roloj
- Plibeligis la filtrilojn ĉe la membromastrumada sistemo
- Diversaj internaj plibonigoj
- Kreis sistemon por financaj raportoj de AKSO-Pago
- Riparis diversajn cimojn en AKSO-Pago
- Diversa planado pri revuoj kaj kongresoj

**Julio 2020**

- Kreis unuafazan interfacon por administrado de kongresoj
- Diversaj grandaj internaj ŝanĝoj
- Riparis diversajn cimojn pri membreckategorioj
- Riparis diversajn cimojn ĉe membroprofiloj
- Aldonis kelkajn funkcietojn al kongresoj
- Multe da laboro pri la kongresa interfaco
- Plibonigis konektilon por konekti AKSO al Grav

**Aŭgusto 2020**

- Diversaj aldonoj, plibonigoj kaj riparo de cimoj pri kongresoj
- Diversaj plibonigoj al aŭtentiko celante plibonigon de la konekto inter AKSO API kaj UEA.org
- Grandaj internaj ŝanĝoj al AKSO-Pago
- Riparis diversajn sekurecajn problemojn
- Multe da laboro pri la kongresa interfaco

- Ekpreparas por alfatestado: Kreis liston de invitotoj

**Septembro 2020**

**API**

- Plene rekreis la balancan raporton de AKSO-Pago por ŝpuri donacojn en diversaj valutoj kaj pli bone doni superrigardon de diversbalancaj ŝanĝoj
- Gravaj ŝanĝoj al celoj en pagoj de AKSO-Pago
- Aldonis AKSO-Agojn al AKSO-Pago
- Implementis konekton inter AKSO-Pago kaj aliĝintoj en la kongresa sistemo

**Admin**

- Aldonis redaktilon de formularoj
- Aldonis kotizojn al pagmetodoj
- Aldonis bildetojn al pagmetodoj
- Pliaj etaj plibonigoj, ekz. aldonis redaktilon de monsumoj kun valuto

**Redaktilo de AKSO skripto**

- Aldonis formularajn variablojn
- Aldonis redaktilon de matricoj kaj ties montradon
- Diversaj pli grandaj internaj ŝanĝoj
- Integrigis kun AKSO-Admin

**Oktobro 2020**

API

- Riparis diversajn sekurecajn problemojn
- Diversaj ŝanĝoj por plirapidigi kaj plisekurigi internajn procedurojn de AKSO
- Riparis multajn plenromajn cimojn
- Ĝisdatigis diversajn bibliotekojn uzatajn de AKSO

Admin

- Aldonis AKSO-agojn al AKSO-Pago
- Aldonis redaktilon de kongresaj aliĝiloj
- Aldonis filtrilon laŭ loko al kongresaj lokoj kaj programeroj
- Diversaj plibonigoj kaj cimriparoj
- Aldonis amasmesaĝojn
- Aldonis sistemon por mastrumado de aliĝintoj de kongresoj
- Ekaldonis malfermajn horojn al kongresaj lokoj

UEA.org

- Aldonis kongresajn aliĝilojn

Redaktilo de AKSO-skripto

- Aldonis @@-formulajn variablojn

**Novembro 2020**

API

- Aldonis API-on por ricevi la plej lastajn valutajn kurzojn laŭ la lasta ĝisdatigo de AKSO
- Riparis multajn plenrompajn cimojn kaj diversajn cimetojn

UEA.org

- Kreis pagsistemon por aliĝoj al kongresoj kiu integriĝas kun AKSO-API
- Aldonis lokojn al kongresoj

pago.akso.org

- Ekkreis la sistemon, kiu estas perilo inter AKSO-Pago en AKSO-API kaj UEA.org, reflektante la ŝanĝojn en AKSO-Admin

Admin

- Diversaj riparoj de cimoj

**Decembro 2020**

Vincent feriis dum duono de tiu ĉi monato, kaj dum la cetero monato li malpli laboris pro tio ke li malsaniĝis per COVID-19. Vincent nun denove sanas.

API

- Verkis dokumentigon pri la membriĝa sistemo
- Aldonis API-on por ŝanĝi agordojn pri membriĝoj
- Aldonis taskon por trakti problemajn membriĝojn

UEA.org

- Diversaj plibonigoj, ekz. plibonigis la listigon de kongresaj lokoj
- Aldonis filtrilojn de kongresaj lokoj
- Aldonis kongresajn programerojn

La progresraportoj pri septembro ĝis decembro ankoraŭ ne estas finverkitaj. La plena superrigardo troveblas ĉe akso.org.

## Paulína Jalakšová

*raportas Paulína Jalakšová, Subvencipetisto (ekde 2019)*

Mi komencis duontempe labori kiel subvencipetisto de TEJO en septembro 2019. Krom taskoj rilataj al subvencioj, mi aktivis ankaŭ en eksteraj rilatoj kaj helpis pri volontuloj.

### Subvencioj kaj Projektoj

Kandidatiĝis por pluraj Erasmus+ projektoj, kiuj ne estis sukcesaj.

Kandidatiĝis kiel partnero por la projekto ene de “European Youth Together” fonduso kun la organizo “Youth of European Nationalities” kaj daŭre atendas la rezultojn.

Oktobre, kun Spyros, plenigis kandidatiĝon por Internacia Aktivaĵo de Eŭropa Junulara Fonduso pri aktivismo tra arto kaj teatro kaj ĝi estis sukcesa.

Novembre kandidatiĝis por la administra subvencio. Februare plenigis raporton de la administra subvencio por 2019.

Sukcese kandidatiĝis por ESC projekto tra kiu TEJO havas volontulojn en Roterdamo. Aŭguste kaj printempe plenigis raportojn por projektoj, tra kiuj ni havis 2 antaŭajn grupojn de volontuloj.

Estis membro de la trejnista teamo de la reta studsesio pri seksismo en lingvo, kiun mi helpis kunorganizi, kreis taskojn por partoprenantoj, kreis materialojn, ktp. La studsesio estis vere sukcesa.

### Volontuloj

Krom kandidatiĝo por fondusoj kaj raportoj pri projektoj, tra kiuj TEJO havas volontulojn, mi okupiĝis ankaŭ pri adminsitraĵoj rilataj al volontuloj - kontraktoj, iliaj alvenoj, bonvenigaj kaj mezperiodaj trejnadoj.

### Eksteraj rilatoj

Mi kandidatiĝis por kaj estis elektita kiel membro de Spertula Grupo pri Junularaj Rajtoj de FoJE, kie mi reprezentas la valorojn de TEJO.

Nome de TEJO partoprenis plurajn retajn eventojn - Ĝeneralajn Asembleojn de FoJE, Informesiojn pri malsamaj fondusoj, renkontiĝojn de Erasmus+ Koalicio, ktp.

Kontaktis plurajn neespserantistajn junularajn internaciajn organizojn por kunlabori en projektoj kaj sukcesis.

### Aliaj

Kontribuis al la kreado de Realigplano, Strategia plano kaj Buĝeto de TEJO.

Faris liston de aldonaj eblaj rimedoj por finacado de TEJO kaj komencis esplori la eblecojn.

Komencis fari gvidliniojn por subvencipetado en TEJO.

## Spyros Papadatos

*raportas Spyros Papadatos, Oficisto pri Eksteraj Rilatoj (2019-2020)*

La pozicio de KER-oficisto estis kreita en 2018, sed mi laboras en ĉi tiu pozicio ekde septembro 2019. 2020 do estis la unua plena jaro laboranta por TEJO kaj mi povas raporti laŭe. Mi daŭre laboras de Bruselo kaj lernas Esperanton pli sisteme, sed ĉi-jare kompreneble estis markita de COVID-19. Ĉiuj fizikaj eventoj de marto ĝis hodiaŭ (kaj dum la unuaj monatoj de 2021) estis nuligitaj, do la laboro translokiĝis tute interrete. Tio certe efikas alla kvalito de la laboro, ĉar eksteraj rilatoj fariĝas pli bone persone, sed la situacio estas la sama por ĉiuj, do ni ne estis misproporcie trafitaj. La situacio estis la sama por ĉiuj tutmonde

Ĉi tiu raporto estas resumo de mia laboro, kiun vi povas trovi ankaŭ en miaj diversaj monataj raportoj en Centro Reto.

Ni daŭre kunlaboris kun EU kaj ne-EU institucioj. Ni ofte aliĝis al la diversaj eventoj de Eŭropa Socio kaj Ekonomia Komitato (EESC). Aldone ni klopodis konservi kaj pliigi nian kunlaboron kun Konsilio de Eŭropo (KdE). En 2019, ni sukcese kandidatiĝis por 2 subvencioj kadre de KdE: unu studsesio pri seksismo kaj parola lingvo (X-Lingvo en Budapeŝto, Hungario) kaj unu nacia trejnkurso pri Homaj Rajtoj Edukado kun la Nacia Junulara Konsilio de Slovenio - MSS (COMPASS NTC en Slovenio). En 2020, la fokuso estis efektivigi ilin, sed COVID-19 influis ĉiujn tiujn monatojn de preparo kaj efektivigo. En septembro 2020, ni prenis la decidon nuligi la COMPASS NTC kun MSS kaj transdoni la projekton X-Lingvo al interreta formato. Ni efektivigis X-Lingvo interrete sukcese por 20 junaj partoprenantoj kun unu teamo de 6 TEJO-membroj kaj 1 KdE-trejnisto.

Aldone, ni kandidatiĝis por 4 pliaj KdE subvencioj por 2021: 1) Unu studsesio pri medio kaj homaj rajtoj en Strasburgo, Francio en marto 2021, 2) Unu trejnado pri intersekcieco kaj kontraŭbatalado de multnombraj diskriminacioj kun SKEJ (SlovaKia Esperanto Junularo) en Slovakio por printempo 2021, 3) Unu trejnado pri alternativaj formoj de Homaj Rajtoj Edukado (teatrologio, artivismo) paralele kun IJK 2021 en Ukrainio en julio 2021 kaj 4) La resendo de la X-Lingvo studsesio por aŭtuno 2021. Ĉiuj 4 subvenciaj petoj sukcesis!

Unu alia granda parto de mia laboro ĉi-jare estis denove la rilatoj kun la Forumo Junulara Eŭropa (FoJE). Ni sendis partoprenantojn al ĝiaj diversaj eventoj, ni estis reprezentitaj en la du ĝeneralaj asembleoj (Paulina en junio 2020 kaj mi kaj Paulina en novembro 2020). Paulina sukcese kandidatiĝis por la Spertogrupo pri Junularaj Rajtoj kaj ni ankaŭ kandidatiĝis kiel TEJO por esti parto de la Koalicio Erasmus+. Ankaŭ Paulina kandidatiĝis por la FoJE-estraro kaj estis elektita sukcese por 2021-2022, kio estas unu granda sukceso por TEJO.

En 2020, EYE kaj Yo!Fest devus okazi en majo en Strasburgo. Ni kandidatiĝis en 2019 kiel partneroj de la eventoj kaj ni atingis financan subtenon por la partopreno de 20 junaj TEJO-membroj. Tamen, pro KOVIM-19, la eventoj estis nuligitaj. Nuntempe la eventoj translokiĝas al majo 2021 (depende de la pandemiaj evoluoj) kaj ni konservas nian statuson kiel partneroj kaj la financan subtenon por 2021.

Unu alia grava procedo por KER estas la EU Junulara Dialogo, la politika procezo de EU por krei dialogon kaj spacojn por ke junuloj kaj politikistoj interrilatu. Kiel okazis en la realigoplano de 2019-2020, en 2020 unuafoje ni kandidatiĝis kiel partneroj de la 8a ciklo de la EU Junulara Dialogo kaj ni estis akceptitaj. Per ĉi tiu partnereco dum la venontaj 18 monatoj (julio 2020-decembro 2021), ni rajtas sendi reprezentantojn de TEJO al la EU Junularaj Konferencoj ĉiun sesan monaton (Tuŝka partoprenis la germanan konferencon en oktobro 2020), formi la procedon kaj organizi konsultojn kun junuloj kaj politikistoj por alporti

la voĉon de eŭropaj junuloj al EU. Unu granda interreta konsulto estas organizita en decembro 2020 kun 11 pliaj junularaj organizaĵoj kaj kun diversaj politikistoj.

Mi aldone subtenis la laboron de TEJO pri partoprenado en aliaj tutmondaj junularaj platformoj, kiel UNOY; Mi ĉeestis en diversajn kunvenojn de la platformo kiam TEJO bezonis tion, respondis al la petoj kaj plenumis la petitajn taskojn kaj laŭeble subtenis la UNOY komiciston, Ana.

Ankaŭ ĉi-jare, pro la manko de fizikaj eventoj, mi pli aktive kontribuis kaj laboris pri niaj rilatoj kun UN kaj nia engaĝiĝo en ICMYO/IKRJO. Ekde printempo 2020, mi prenis la respondecon de kunordigi nian engaĝiĝon en la IKRJO-taskaro kaj nian reelekton por la taskaro 2020-2021. Iuj el miaj ĉefaj taskoj en 2020 estas partopreni ĉiujn IKRJO-kunvenojn, faciligi la plimulton de ili, esti en la laborgrupo por la MoU kun MGCY, redakti la GCIYO-pozicion, esti la kontaktulo kaj partopreni la laborgrupon por la EKOSOK Junulara Forumo 2021. Ĝenerale ni sukcesis pliigi nian engaĝiĝon en UN, vastigi nian reton kaj plifortigi nian nomon en UN-procedoj.

Laste, mi provis doni al la estraro pli eksteran vidon pri la interna funkciado de la organizo kaj oficejo, samtempe kun helpo pri la Strategia Plano 2021-2025. Somere, pro la foresto de volontuloj kaj mia malpli granda laboro, mi prizorgis la oficejo-retpoŝton. Mi faris la jarajn ĝisdatigojn de TEJO en diversaj platformoj kiel la Travidebla Registro, la Eŭropa Junulara Fondaĵo, la Unio de Internaciaj Asocioj (UIA).

# Volontuloj

*raportas Mung Bui (Feliĉa), Kasisto (2017-2021), Karina Oliveira, Estrarano (2019-2021)*

Resume, dum 2020 volontulis en TEJO kadre de rekompenca programo:

- Maria Leonor Pacheco (Portugalio), ekde septembro 2019 ĝis junio 2020
- Afroditi Konstantopoulou (Grekio), ekde novembro 2019 ĝis junio 2020
- Ernesto Sánchez Hernández (Hispanio), de novembro 2019 ĝis junio 2020
- Valentin Ceretto Bergerat (Francio), de augusto 2020 ĝis aŭgusto 2021
- Renato Guedes Filho (Brazilo/Portugalio), de septembro 2020 ĝis septembro 2021
- Quentin Auduc (Francio), de julio ĝis decembro 2020

## Loĝado kaj laborkondiĉoj

Ĉiuj eŭropdevenaj volontuloj deĵoris en la Centra Oficejo (CO) en Roterdamo kadre de la Eŭropa Volontula Servo, programo pagata de Eŭropa Komisiono. Ili ĉiuj loĝis en la Volontula Domo de UEA. Volontuloj nun ĝuas pli bonajn laborkondiĉojn ol antaŭe, ĉar la TEJO-oficejo

en la Centra Oficejo de UEA moviĝis de malgranda ĉambro en la tria etaĝo al pli granda ĉambro en la dua etaĝo. Ni ankaŭ aĉetis novajn komputilojn por la laboro de la volontuloj.

## Alvoko kaj elektoj

La publikigo de alvoko por novaj volontuloj por la eŭropa studjaro 2020-2021 okazis en majo 2020. Kiam unu el la elektitaj kandidatoj decidis nuligi sian volontuladon, okazis dua sukcesa alvoko por novembro 2020.

## Valentin Ceretto Bergerat

*raportas Valentin Ceretto Bergerat, Volontulo en CO per ESK (ekde aŭgusto 2020)*

Mi alvenis al Roterdamo fine de aŭgusto 2020. Iom post iom, la aŭtuna etoso de Nederlando fariĝis hejma, dum la pandemia situacio enhejmigis nin en Roterdamo.

Komence de septembro mi ekzorgis diversajn taskojn kun la nova Estraro kaj volontuloj. Kun la nova mandatperiodo venis bezono disdatigi la diversajn datumbazojn de TEJO, ĉefe la retpoŝtlistojn (ĉe Guglaj Grupoj) kaj en la Centra Reto, tiel ke la nova statuso de la aktivuloj (ĉu estrarano, eks-estrarano, kominatano…) kongruu kun la aneco en la diversaj servoj.

Same kiel la aliaj volontuloj, mi rekte kunlaboradis kun la estraranoj pri diversaj aferoj kaj administrado de TEJO.

Grava kaj ofta tasko de volontuloj estas protokoli la diversaj Estraraj Kunsidoj (EsKu), kiuj plejparte okazis rete plurfoje monate, same kiel dum la ĉeesta septembra EsKu en Rotermado. Okaze kaj sekve de tiu kunveno okazis pluraj diskutoj kaj klarigoj pri niaj taskoj kaj ilia disdonado. (Longa) provlegado de niaj protokoloj ankaŭ sekvis ĉiujn sesiojn.

Aldone al la oftaj EsKu, la Komitata Kunsido (KoKu) finnovembre estis parte organizita de la 3 volontuloj. Mi malgraŭ mi kunordigis la disdonon de taskoj inter la volontuloj anticipe de KoKu. Akorde kun la aliaj organizantoj, ni zorgis pri la teknika helpo al partoprenantoj en Zoom (la softvaro, kiu estis uzata por la kunsido), la protokolado dumsesie kaj la testsesioj anticipe. Sekvis historie tro longa provlegadado de tiu protokolo.

RIlate al retaj kunsidoj, mi ankaŭ aktive enpletiĝis en la Komisiono pri Ekstreraj Rilatoj (KER), kies kunsidojn mi ĉiumonate organizis kaj protokolis.

Alia grava kaj ofta tasko estis la prizorgado de la retpoŝtokesto de TEJO, kiu estis laŭvice traktata de ni tri. La papera poŝto estis traktata en la Centra Oficejo (CO) kaj sendita al la koncerna estrarano. En CO ni ankaŭ iom post iom klopodis listigi la posedaĵojn de TEJO.

Okaze de pluraj retaj eventoj, la volontuloj prezentis TEJO-n kaj sian agadon kun alia volontulo aŭ estrarano. Mi ekzemple faris tiel okaze de GEJ-seminario (germane) kaj de la Komuna Seminario (esperante).

Mi ankaŭ partoprenis la organizadon de kelkaj projektoj mastrumataj de TEJO kun Konsilio de Eŭropo (KdE), ĉefe la projekto X-Lingvo. Dum la unua retsesio en Septembro, ni duope traktis la teknikan aspekton kun Zoom, kiel enlasi partoprenantojn. Mi poste kontribuis al la preparo de instrua-materialoj por la sekvantaj sesioj, proponante plibonigojn en la prezentaĵoj. Helpe al Spyros pri raportado al la Konsilio de Eŭropo, mi ankaŭ verkis raporton pri antaŭa pretiga kunsido de la organizantoj.

Mi ankaŭ verkis oficialan leteron al la Konsilio de Eŭropo, petante ke Esperanto estu aldonita al ĝia datumbazo de lingvoj por kantidatoj al staĝoj kaj postenoj. Ĝin mi verklis franclingve kunlaborante kun estraranoj kaj oficistoj de TEJO, kaj mi forsendis ĝin novembre.

Krom TEJO, ni ankaŭ laŭvice helpis la oficistojn de UEA kun diversaj aferoj, kiel arkivado aŭ sendo de revuoj kaj pakaĵoj.

Finfine, parte de pli personaj projektoj kaj lernado, la volontuloj lernis video-muntadon helpe de la estrarano Karlos, unue per grupa lerna projekteto.

Krome, mi daŭrigis mian lernadon de la nederlanda lingvo, parte sole per libro, parte per retlecionoj apogitaj de TEJO. Mi ankaŭ kontribuis al la Revuo Kontakto, interalie per artikolo pri Surinamo.

## Renato Guedes Filho

*raportas Renato Guedes Filho, Volontulo en CO per ESK (ekde septembro 2020)*

Mi alvenis al Roterdamo en septembro 2020, kiam komencis ĉeesta estrara kunsido. Ekde tiam mi helpis la estraranojn pri administraj taskon. Unu el la plej gravaj taskoj estas okupiĝi pri verkado kaj provlegado de la protokoloj ellaboritaj dum la virtualaj EstrarKunsidoj (EsKu). Dum tiuj kunsidoj krom esti aktualigitaj de la nunaj taskoj ofte mi kaj la alia(j) volontulo(j) ricevis novajn taskojn por la kuranta semajno. Ni kiel volontuloj apogis ankaŭ la okazigon de Komitata Kunsido (KoKu) fine de novembro per teĥnika apogo, livero de protokolo kaj anticipaj testsesioj por partoprenontoj.

Krom la renkontiĝoj, ni voluntuloj zorgis la retpoŝtan keston de la oficiala retadreso de TEJO. Ni ankaŭ reprezentis la organizon en lokaj kaj internaciaj Esperantaj renkontiĝoj rete kune kun estrarano. Mi aldone zorgis pri la retpaĝo de TEJO, ĉefe pri la publikigo de novaj afiŝoj kaj aktualigante ĝiajn paĝojn kaj informojn.

Kadre de miaj ekskluzivaj aktivecoj por TEJO mi tradukis artikolojn por la revuo Unesko-kuriero kaj por TutMondaj Voĉoj, skribis artikolon por Libera Folio, prelegis pri Esperanto en la Pernambuka Esperanto Asocio, donis klasojn pri Esperanto al nova staĝanto, kontribuis al la diskutoj okazintaj ĉe Egaleco, interalie proponante la revivigo de la projekto voĉlegita Vikipedio kaj helpis okazigi IRIS, Internacia Reta Interfaka Simpozio. Krome, mi

helpis en la sendado de nakiĝtagleteroj al patronoj de la organizo kaj zorgis pri la publikigo kaj aktualigo de la novaĵoj kaj afiŝoj ĉe la oficiala retpaĝo de TEJO.

Mi helpis UEA kiam bezonate,, ekzemple pri pakado de revuoj, arĥivado de dokumentoj kaj speciale pri la aktualigo de la voĉlegita versio de la revuo Monato.

Kadre de persona lernado kaj projektoj, mi eklernis videomuntadon helpe de estrarano kaj atingis proksimume A1-B2 nivelo en la nederlanda lingvo.

### Quentin Auduc

*raportas Quentin Auduc, Volontulo en CO per EKC (ekde 21a de julio 2020 ĝis la fino de decembro 2020)*

Mi alvenis al Roterdamo komence de julio, sed pro la kronviruso kaj ŝanĝo de estraro, mi nur zorgis kelkajn etajn taskojn hejme.

Laboro vere komenciĝis komence de septembro. Pri la komunaj taskoj de volontuloj, Valentin bone priskribis ilin supre.

Krome, mi okupiĝis pri TEJO-aktuale, pri la eventaservo paĝo de TEJO kaj pri sendado de retmesaĝoj/leteroj al TEJO patronoj por gratuli ilin okaze de la naskiĝtago. Mi ankaŭ helpis Charlotte prezenti TEJO aleksteren dum reta kunsido de la klubo de Antverpeno/Londono, kaj prezentis sola al Esperanto Kultur-Centro. Mi laboris pri kvalita analizo de respondoj al demandaro pri TEJO/UEA membreco.

Mi ankaŭ kolektis la kandidatiĝojn de la venontaj volontuloj kaj resumis ilin en iu tabelo por plifaciligi la laboron kaj elekton de la estraro.

Pri la lernado, mi multe lernis pri videoproduktado ĝenerale, kaj faris unu videon kun la aliaj volontuloj, kaj alian sola  por la Zamenhoftago.

## Rilatoj kun UEA

*raportas Mung Bui (Feliĉa), Kasisto (2017 -2021), kun kontribuo de Klára Ertl, Estrarano pri Rilatoj kun UEA (2020-21)*

Dum 2020 TEJO kaj UEA daŭre tenis varman rilaton. Observantoj de TEJO ĉe UEA estis Mung Bui kaj Luis Obando (ĝis aŭgusto), kun Karina kaj Klára en la  la postenoj poste. Samtempe UEA havas du observantojn en TEJO (vicprezidanton Fernando Maia Jr kaj ĝeneralan sekretarion Aleks Kadar).

TEJO kaj UEA ankaŭ kune dungas KER-oficiston kaj kunordiganton de la volontuloj en la CO kaj KER-oficiston. Ekde marto 2019 ni kune plenumas la projekton AKSO, kiu ĉefe temas pri

Administra Komuna Organizado. Detaloj pri la plenumo de tiu ĉi projekto troviĝas en la raporto de Mia supre.

TEJO kaj UEA kunlaboris pri temoj kiuj tuŝas ambaŭ organizojn, ekzemple TEJO analizis por uzo de ambaŭ organizoj la malfermajn respondojn al la demandaro pri membreco en UEA/TEJO kaj kontribuis al AMO-seminario pri varbado de junuloj.

## Rilatoj kun Patronoj

*raportas Klára Ertl, respondeca Estrarano pri rilatoj kun Patronoj (2020-21)*

Je la eko de la nova estrarmandato 2020-21 estiĝis plano por plifortigi rilatojn kun la patronoj de TEJO. Sekve, ĉiuj patronoj ricevis novembre oficialan retmesaĝan komunikon de la Estraro, kun detala ĝisdatigo pri la lastatempaj agadoj de la organizo. La respondeca estrarano atentis pri naskiĝtagoj de la patronoj, taskigante la volontulojn en Centra Oficejo sendi retmesaĝon por ĉiu naskiĝtago, aŭ poŝtkarton okaze de atingita aĝo kiu estas oblo de kvin aŭ dek (50-jariĝo, 55-jariĝo, 60-jariĝo, ktp.). Por Zamenhoftago, ĉiuj patronoj ricevis bondeziran poŝtkarton kun invito repatroniĝi por la jaro 2021, manskribitan de niaj volontuloj. Fine de la jaro komencis laboro pri membriĝ- kaj patroniĝkampanjo por la nova jaro.

Estas ankaŭ intenco sendi poŝtkartojn okaze de ĉiu fizika Estrarkunsido, bedaŭrinde tiu intenco ekestis post la nura ĝisnuna fizika estrarkunsido en septembro, kaj ekde tiam ne eblisfizike kunsidi pro la pandemio. Ankaŭ pro la pandemio ne eblis organizi Patronan Akcepton dum UK 2020. Ni intencis anstataŭigi ĝin per reta evento.

# Parto 2: Komisionoj

## Aktivula trejnado

*raportas Tomáš Stano, Vicprezidanto (2020-2021), Vickomisiito pri aktivula trejnado (2019-2020), kaj Michael Boris Mandirola, Komisiito pri Aktivula Trejnado (ekde aŭgusto 2019)*

En 2020 la komisiono pri aktivula trejnado fokusiĝis pri la liverado de trejnadoj dum diversaj aranĝoj, ne nur ĉeestaj, kiuj okazis ĝis marto, sed ankaŭ dum retaj eventoj, kiuj okazis dum la plejparto de  2020, pro la kronvirusa situacio. Aktivula trejnado provis kunlabore kun la estraro kaj oficistoj subvencipeti por la programo "Trejnu la Trejniston", kaj provis regule komunikiĝi pri novaĵoj, novaj ideoj kaj ontaj planoj dum diversaj retkunsidoj. La "estrareto" de la komisiono pri aktivula trejnado estis gvidata Michael Boris. Michael Boris ofte diskutas kun la estraro kaj aliaj aktivuloj pri bezonoj de trejnadoj en diversaj fakoj kaj pripensas en grupo kun trejnistoj eventualan engaĝiĝon de la komisiono en diversaj internaciaj projektoj de TEJO.

En la plano de la komisiono estis organizi TEJO-trejnista renkontiĝon dufoje en la jaro 2020, sed pro la viruso ne eblis okazigi ilin ĉeeste, do estis strebo de la komisiono okazigi ĉiujn eventojn dum la jaro rete. La plej aktivaj trejnistoj havis renkontiĝon kun aliaj trejnistoj ĉiun monaton, dum kiu ili havis la eblon pridiskuti trejnadojn, kiujn ili jam faris, kiujn ili ankoraŭ faros en la estonteco kaj ankaŭ laŭ prezento de aktivaĵoj ricevi retrokuplon de la aliaj trejnistoj kaj tiel plibonigi estontajn trejnistojn.

En la jaro 2019 okazis diskuto pri logotipo de la komisiono, propono farita de Ariel Palmer. Neniu decido estis farita pri ĝi ĝis nun.

En la jaro 2020 estis faritaj kelkaj projektproponoj al internaciaj instancoj kaj la komisiono sukcese eniris projekton, kiu enhavos en la programo ankaŭ trejnadon por novaj trejnistoj. Tiel la komisiono havos la ŝancon pligrandigi sian membraron kaj eble allogi pli da novaj trejnistoj por estis aktivaj en esperanto-movado. La komisiono ankaŭ ŝatus fokusiĝi en venonta jaro por renovigi la komisionon, dividi membraron al neaktivaj, malpliaktivaj kaj aktivaj trejnistoj kaj ekscii pri pliaj spertoj de la trejnistoj, por ke ni povu oferti servojn pli kvalitajn kaj pli persone celitajn.

## Kongresoj

### JES 2020/2021

*raportas Charlotte Scherping Larsson, Prezidanto de TEJO (2020-2021), Valentin Ceretto Bergerat kaj Renato Guedes Filho, Volontuloj*

En la jaro 2020 JES ne okazis ĉeeste pro la pandemio de COVID-19. Ĝi okazis rete ekde la 1a ĝis la 3a de Januaro 2021 kaj estos parto de la venonta jarraporto. Kadre de ĝi okazis prezento pri TEJO al la partoprenintoj por popularigo de nia asocio. Kutime dua komitatkunsido de la jaro povas okazi dum JES, sed pro la pandemio la kunsido estis reta kaj okazis en novembro. Legu pli sub "komitatkunsido".

## IJK 2020

*raportas Rogier Huurman (Roĉjo), Membro de la LKK de IJK 2020, kaj Mung Bui (Feliĉa), Kasisto (2017-2021)*

La preparoj por IJK 2020 progresis laŭplane. La nombro de aliĝoj estis iomete pli alta ol por 2019; la dormejoj, programejoj kaj manĝoj estis prizorgitaj kaj la programo pli kaj pli kreiĝis. En 2019 la ĉefa prioritato de la teamo estis varbado, kaj en la komenco de 2020 la ĉefa zorgo iĝis plenigi la programon. La helpo de Ariel, Mia kaj multaj aliaj TEJO-aktivuloj kontribuis grave en diversaj momentoj.

Bedaŭrinde, pro COVID-19 la preparlaboro por IJK 2020 tute haltis en marto 2020 kaj la fizika IJK estis nuligita. En aprilo ni rekomencis preskaŭ de nulo por okazigi retan IJK-on. Post sukcesa okazigo de la Poliglotkunveno de E@I, la IJK-teamo decidis uzi ĝian retan platformon. La aliĝoj kaj kotizoj rapide kolektiĝis, kaj la programo pli kaj pli pretis. Por havi retan IJK-on por ĉiuj, ni ankaŭ starigis fonduson por la homoj kiuj malfacile povas pagi la kotizon de la kongreso (20 EUR); la homoj povas peti de la IJK-fonduso senpagan partoprenon.

La reta IJK estis sukceso laŭ la pritaksoj de partoprenantoj kaj laŭ la statistiko. 316 homoj en 52 landoj partoprenis, tiel IJK 2020 estis la plej granda IJK post 2009, kaj la plej diversa iam ajn. Ankaŭ finance ĝi estis sukceso: la kotizenspezoj estis altaj, parte pro la sistemo de subtenaj kotizoj, per kiu multaj IJK-novuloj povis partopreni. La profito preskaŭ kovras la perdon de la alta kaŭcio por la kongresejo en Nederlando.

## Partoprenu IJK-n 2020

*raportas Mung Bui (Feliĉa), Kasisto (2017-2021)*

Danke al la monsubteno de la fonduso Partoprenu IJK-n kaj donacoj de esperantistoj al la fonduso, dek homoj el ok diversaj landoj ricevis subtenon por partopreni la Internacian Junularan Kongreson IJK 2020 en Nederlando. Jen estas ili:

- Albert Stalin Garrido (Filipinoj)
- Elena Blandino (Hispanio)
- Ana Gómez Garrido (Hispanio)
- Kamil Getka (Pollando)
- Maria Sułkowska (Pollando)
- Simon Higgins (Irlando)
- Vinícius HPR (Brazilo)

- Daun Jeong (Sud-Koreio)
- Davido Carranza Navarrete (Meksiko)
- Gilbert Niyukuri (Burundo)

Pro la nuligo de fizika IJK 2020, la subteno al la kandidatoj estis ŝovita al la sekva IJK.

## Preparado de IJK 2021

*raportas Mung Bui (Feliĉa), Kasisto (2017-2021)*

Malferma alvoko por IJK 2021 estis anoncita en oktobro 2019. En tiu unua alvoko venis kiel sola kandidato Britio; sed en la komitatkunsido dum JES, Britio oficiale nuligis sian kandidatiĝon. Tuj poste TEJO remalfermis alvokon kaj venis 5 bonaj kandidatoj kaj fine TEJO elektis Koreion por gastigi IJK 2021 sur la insulo Jeju. Sed bedaŭrinde pro COVID-19, Maje la elektita lando anoncis nuligon de IJK 2021 en Koreio. La komisiono pri kongresoj refunkciis kaj kune laboris kun la estraro por trovi solvon. Post kontakto kaj laboro kun multaj organizoj, finfine TEJO elektis Ukrainion por gastigi fizikan IJK 2021, krome la komisiono pri kongresoj daŭre laboros por organizi retajn eventojn.

# Eksteraj rilatoj

## UNITED

*raportas Michael Vrazitulis, Komisiito pri UNITED (ekde oktobro 2020)*

La virtuala konferenco fine de septembro 2020 estis mia unua kontakto kun UNITED kaj la aktivuloj el niaj partneraj organizoj. Krom mi, kiu aliĝis nome de la landa sekcio GEJ, ankaŭ partoprenis Valentin Ceretto, nuntempa volontulo en CO. La konferenco mem estis vere riĉa je programo, la ĉeftemo estis la rolo de la junularo kaj municipoj en la kontraŭbatalado de la defioj kiujn la globala krizo de la COVID-19-pandemio ĉien alportas. Estis iom post la okazo de la septembra konferenco, kiam mi transprenis la rolon de komsiito pri UNITED.

Al la ĉiujara novembra kontraŭfaŝisma kampanjo de UNITED, TEJO aktive kontribuis per reta prelego kun la titolo "Pogromoj kontraŭ judoj, la estiĝo de Esperanto kaj la sorto de la familio Zamenhof", realigita de mi. Ĝi estis dulingva esperante kaj angle, por ke ankaŭ neesperantaj aktivuloj povu sekvi. La celoj elo estis rememorigi pri la datreveno de la Novembraj Pogromoj ("Kristalnokto") de 1938 en Germanio, kaj iom prilumi la interligiĝon de la triste longa tradicio de antisemitisme motivitaj atakoj kun la propra viva kaj ideologia evoluiĝo de la juddevena Ludwik Lejzer Zamenhof kaj la biografioj de liaj gefiloj. Kvankam privarbado flanke de UNITED iom malfruis pro komunikaj malfaciloj, la eventon ĉeestis pli ol 35 homoj kaj sekvis tre fruktodona diskutrondo poste.

Decembre finfine okazis plia reta konferenco starigita de UNITED, ĉi-foje pri klimata justeco kaj paco. Ĉar mi mem pro fortaj privataj okupiĝoj ne povis partopreni, tiu respondeco estis

transprenita de John Magessa. Por la venonta jaro, certe strebindas daŭre aktive kontribui al kampanjoj kaj konferencoj de UNITED, nome de TEJO, ĉu virtuale ĉu surloke.

## UN & Unesko

*raportas Rakoen Maertens, Komisiito pri KER-agado ĉe UN kaj Unesko*

Pro la pandemio, la plimulto de la UN- kaj Unesko-eventoj aŭ ne okazis aŭ aperis sub limigita formo. Tio malfermis novajn eblojn por atingi pli da homoj per novstilaj agadoj. Kunlabore kun UEA, ni organizis plurajn eventojn pri UN kaj Unesko por Esperantistoj *kaj* ne-Esperantistoj. Ni prelegis dum *Polyglot Gathering 2020*, el kiu rezultis anglalinvgva enkonduko pri nia agado libere spektebla ĉe YouTube. Poste, TEJO havis gravan rolon en la teamo pri la festivala temo de MondaFest' 2020, *UN 75-jara: Dialogo kaj interkompreniĝo en ŝanĝiĝanta mondo*, kaj tiel kunorganizis dekojn da eventoj por lertigi Esperantistojn kaj ne-Esperantistojn pri la graveco de nia agado ĉe UN kaj Unesko. Inter alie, nun spekteblas superrigarda video pri nia agado en Esperanto ĉe YouTube. Venos en Februaro 2021 pli granda raporto pri la rezultoj de nia agado pri MondaFest' 2020.

Dank' al la agado de KER-oficisto Spyros Papadatos ni denove estis elektitaj kiel membro de la gvida teamo de IKRJO (Internacia Kunordiga Renkontiĝo de Junularaj Organizoj), kiu metas nin en pozicio strategie tre oportuna por altnivela agado ĉe UN kaj Unesko (legu pli en la raporto de Spyros Papadatos supre).

## UNOY

*raportas Ana Ribeiro, Komisiito pri UNOY (ekde 2018)*

2020 estis malfacila jaro por la reto UNOY. Ĉiuj ĉeestaj renkontiĝoj planitaj estis nuligitaj. Ĝi faris kelkajn malmultajn retajn eventojn, sed pro personaj kialoj mi sukcesis partopreni en neniu.
Oktobre, mi kunsidis kun Charlotte Davidi (oficisto de UNOY) pri la agado de TEJO, kaj ŝi ŝajne havis tre bonan impreson pri ni kaj tre scivolemis pri nia agado, kaj esperinde ni plu kunlaboros kiam la monda situacio estos pli favora.

## Forumo Junulara Eŭropa

*raportas Paulína Jalakšová, Delegito de TEJO ĉe FoJE (ekde 2018)*

Pro la pandemia situacio, la konsilio de membroj (CoMem) kaj la ĝenerala asembleo (ĜA) de FoJE okazis rete. Ambaŭ partoprenis Paulína kaj Spyros. Yo!Fest kun Eŭropa Junulara Evento estis nuligitaj - ŝovitaj al 2021.

CoMem okazis junie kaj enhavis nur bazajn aktivaĵojn kiujn FoJE laŭleĝe devas fari dum ĉiu renkontiĝo tia. Bedaŭrinde la evento havis multajn problemojn, sed fine ĉio planita okazis. La aŭtuna ĜA jam estis pli bone planita kun multaj aktivaĵoj okazintaj antaŭ la evento mem. Temis ekzemple pri politikaj anguloj por pridiskuti politikajn dokumentojn, aŭ poste politikaj komisioj por prezentado de amendoj kaj parte voĉdonado pri ili. TEJO multe kontribuis kun amendoj al pluraj el la dokumentoj kaj la plejparto estis aprobita. Aldone, okazis elektoj de la nova estraro kaj mi, Paulína Jalakšová, estis elektita kiel estrarano de FoJE.

Aldone, Spyros estis membro de la spertula grupo de subvencipetado kaj mi estis elektita kiel membro de spertula grupo pri junularaj rajtoj. Mi perdis tiun postenon Januare 2021, kiam mia mandato en la estraro de FoJE komenciĝis.

TEJO ankaŭ aktive partoprenis en la laborgrupoj pri la revizio de funkciado de FoJE kiel organizo. FoJE planas ŝanĝi multajn aferojn inkluzive de la statutoj kaj aspekto de statutaj eventoj kaj ni, kiel membra organizo, havis la eblon kontribui niajn ideojn.

Danke al FoJE, ni ankaŭ havis la eblecon decembre partopreni en la Eŭropa Junularlabora Kunveno (kaj preparadaj eventoj por ĝi) kaj tra ĝi kontribui al Eŭropa Junularlabora Agendo kaj la Procedo de Bonn. Tie estis TEJO reprezentita de mi kaj Charlotte Scherping Larsson.

# Landa kaj faka agado

*raportas Albert Stalin Tancinco Garrido, Estrarano pri Landa kaj Faka Agado (2020-2021) kaj eksa Komisiito pri Landa Agado en Azio (2019-2020)*

La jaro 2020 estis iamaniere interesa jaro por la Komisiono pri Landa kaj Faka Agado. Flanke de unuopaj landaj kaj fakaj sekcioj de TEJO, ili devis rapide adaptiĝi al novaj cirkonstancoj kiujn alportis la eksplodinta pandemio. Flanke de administrado, aferoj ne estis tre stabilaj, kaj la Komisiono vidis ĝenerale malaltan nivelon de aktiveco tra la jaro. Nur en la jaro 2020 gvidis la Komisionon tri malsamaj individuoj, nome:

- Soraya Alvarez (de la 11-a de marto ĝis la 31-a de aŭgusto 2020)
- Robert Nielsen (de la 1-a de septembro ĝis la 10-a de novembro 2020)
- Albert Stalin Tancinco Garrido (ekde la 30-a de novembro 2020)

Je la elekto de Garrido, estis nomumitaj de li kaj konfirmitaj de la Estraro en decembro la jenaj kontinentaj vickomisiitoj:

- Jeong Jae-hyun (Sud-Koreio), *Azio kaj Oceanio*
- Abyssinie Ahonon (Benino), *Okcidenta Afriko*
- John Magessa (Tanzanio), *Orienta Afriko*
- Javier Ramos Nistal (Kubo), *Norda kaj Centra Ameriko*
- Alexandre Raymond (Brazilo), *Suda Ameriko*

Je la skribo de la raporto, ankoraŭ vakas la posteno pri la Ĝenerala Komisiito pri LFA kaj vickomisiitoj pri Eŭropo kaj pri Faka Agado.

Unu el la plej gravaj laboraĵoj de la Komisiono, la Kompleta Demandaro pri Esperantistaj Junularaj Organizoj (KODEJO), ĉi-foje por la jaro 2018, estis verkita kaj publikigita per la iniciato de Soraya Alvarez surbaze de la serio de enketoj kiujn en 2019 lanĉis Querino Neto, tiama ĝenerala komisiito pri LFA. La KODEJO pri la jaro 2020 estos prilaborita en 2021.

TEJO ankaŭ vidis la aliĝon de unu nova landa sekcio; Junulara Esperantista de Tanzanio Organizo (JETO), kies aliĝon akceptis la Komitato dum sia kunsido en julio 2020. En decembro 2020, Indonezia Esperantista Junulara Organizo (IEJO) formale prezentis sian kandidatiĝon por fariĝi landa sekcio. La aliĝprocedo daŭros ĝis meze de 2021.

## Afriko

*Mankas raporto*

## Azio

*raportas Albert Stalin Tancinco Garrido, Estrarano pri Landa kaj Faka Agado (2020-2021) kaj eksa Komisiito pri Landa Agado en Azio (2019-2020)*

En la jaro 2020 elstaris la klopodoj de aziaj landaj sekcioj oportune utiligi virtualan agadon por plividebligi sin en la internacia movada areno. Tamen, la aktiveco ne estis tute egala inter landaj sekcioj: kelkaj pli bone aktivis per reta agado; aliaj trovis la procedon adaptiĝi malfacila.

Plej elstaris la sukcesa okazigo de la 38-a Komuna Seminario de Orientaziaj Junuloj (KS) kiujn organizis Korea Esperanto-Junularo (KEJ) kaj okazigis unuafoje rete de la 28-a ĝis la 29-a de novembro 2020. Dum tiu aranĝo ĝi ne nur ebligis partoprenon al dekoj da gastoj el aliaj kontinentoj, kiuj kutime ne povus esti irintaj al la fizikaj aranĝoj de KS, sed ankaŭ donis al pluraj landaj organizoj kaj lokaj kluboj maloftan ŝancon sin prezenti al granda partoprenantaro dum la programeroj “Prezentado de Junularoj” kaj “Raporto pri sia movado.”

En internaciaj virtualaj aranĝoj ne mankis similaj okazoj. Kelkajn monatojn antaŭe, dum la “Tago de Azio kaj Oceanio” en junio 2020 kadre de MondaFest', okazis diskutrondo inter reprezentantoj de landaj sekcioj en Azio kaj Oceanio pri la temo krei pli formalan komunumon de junularaj movadoj. La diskutrondon gvidis Albert Stalin Garrido. Unu monaton poste, dum la reta IJK en julio 2020, okazis la programero “Azia junularo sin prezentas,” dum kiu prezentis sin: IEJO, Filipina Esperanto-Junularo (FEJ), Japana Esperanto-Junularo (JEJ), kaj Ĉina Junulara Esperantista Asocio (ĈJEA). Tiu programero fariĝis unu el la plej spektataj inter ĉiuj programeroj de IJK kun entute 45 ĉeestantoj.

### Eŭropo

*raportas Charlotte Scherping Larsson, Prezidanto de TEJO (2020-2021)*

Ekde la komenco de la mandato de la estraro 2020/2021, kontakto kun landaj sekcioj en Eŭropo estis farita inter alie per kontribuoj al lokaj retaj eventoj.

La kutima finjara aranĝo JES, kutima kunlaboro inter GEJ kaj PEJ, pro la pandemio okazis rete kaj ankaŭ por tiu estis preparita prezento de la asocio. Ĝi okazis en januaro 2021 kaj estis kondukita de Charlotte kaj Renato. Ankaŭ en aliaj momentoj de la jaro 2020 prezentoj estis okazigitaj, kiel en Septembro far de Charlotte kaj Renato al la Hamburga Esperanto Asocio, Oktobre Valentin kune kun Charlotte kaj Konstanze faris prezenton al GEJ, kaj novembre ambaŭ volontuloj, Renato kaj Valentin prelegis pri TEJO al ĉeestantoj de la Komuna Seminario, junulara renkontiĝo en Azio. Kadre de ĉi lasta evento, ankaŭ aliaj naciaj asocioj sinprezentis kiel NEJ fare de Rogier kaj FEJ fare de Albert. Charlotte krome prezentis la asocion al la Londona kaj Antverpa Esperanto kluboj.

## Merkatiko kaj informado

### Merkatiko

*raportas Rogier Huurman (Roĉjo), Estrarano pri Informado (2020-2021)*

TEJO kiel kutime ĉeestas en multaj sociaj retoj: Facebook, Instagram, Twitter kaj YouTube, kaj en la mesaĝprogramo Telegram. Al tio aldoniĝis nun la esperantlingvaj paĝoj Eventa Servo (eventaservo.org) kaj provizore MiaVivo (miavivo.net). Fine de 2020 kreiĝis Subtekstiga teamo, kiu subtekstigas filmetojn de TEJO (ĉefe la serion Enmovade) per la retpaĝo amara.org.

### Retpaĝo

*raportas Rogier Huurman (Roĉjo), Estrarano pri Informado (2020-2021)*

En 2020 Ariel Palmer notis diversajn problemojn en la nuna Wordpress-bazita retpaĝo. Ĉar Mia estas kreanta retpaĝon por UEA kadre de la AKSO-projekto, kaj povus poste relative facile krei retpaĝon por TEJO, mi decidis vivteni la nunan retpaĝon nur per portempe necesaj riparoj. La TEJO-volontulo Renato ĝisdatigis la paĝojn pri komisionoj kaj kelkaj aliaj, kaj ĉefe forigis multajn ne plu uzatajn aŭ ne bone funkciantajn paĝojn.

### Kontakto

*raportas Rogener Pavinski, Redaktoro de* Kontakto

En 2020 la redakta laboro de Kontakto okazis normale. La 6 numeroj aperis sufiĉe akurate, sen grandaj malfruoj. La korektado kaj provlegado ŝuldiĝas al la teknika helpo de la TEJO-voluntuloj, Said Balouchi kaj al la eks-oficisto de UEA Rob Moerbeek. La Movada

Rubriko estas prizorgita de Marcionilo Vasconcelos. La grafikan prilaboradon faris kiel kutime Romulo Felício. Ni tenis la konstantajn rubrikojn (Intervjuoj, La Blaga Blogo, Tiel la Mondo). Aliaj rubrikoj aperis, sed ne konstante (Kontaktek, Facila, Videoludoj).

En Kontakto! ekestis kiel oficiala programero proponita de TEJO por la Monda Festivalo de Esperanto (MondaFest' 2020). Ĝi estas serio de vivelsendaj babiladoj kun la redaktoro Rogner PAVINSKI kaj kunlaborantoj/aŭtoroj de la revuo. La unua sesio invitis la aŭtoron Raoni SOUSA paroli pri la ĉefartikolo de la numero 207. La dua sesio invitis la katalunon Viktoro Solé, kiu respondecas pri "La Blaga Blogo". Ambaŭ videoj spekteblas en la retkanalo de UEA en Youtube (UEA Viva). Legantoj de Kontakto — alia virtuala programero, en kiu la redaktoro renkontiĝis kun la legantoj, okazis la 7-an de aŭgusto, kadre de la Virtuala Kongreso.

En la lasta numero de la 2020-a jarkolekto, Kontakto festis sian 300-an eldonon! Honore al tiu okazaĵo ni preparis specialan afiŝon kun ĉiuj kovriloj de Kontakto ekde la unua numero. Komence de 2020 aperis profilo de revuo Kontakto en Instagram, kiu nun jam kalkulas je 765 sekvantoj.

**Ĉefartikoloj en 2020**

2020.1 **Tutmonda Kaptuka Arto** – Modo, Religio kaj Kulturo
2020.2 **Pandemio Kovim-19**
2020.3 **Sub la flago de Bolsonarismo**
2020.4 **Heroo sen Mono** – Konsiloj de Ŝparemulo
2020.5 **Surinamo** – Nederlanda Spuro en Ameriko
2020.6 **Kio estas Kulturo** – kaj Enkonduko al la Esperanta Kulturo

**Intervjuoj en 2020**

2020.1 **Giorgo Silfer** – Radikala Raŭmismo
2020.2 **D-ro Christoph Klawe** – Pandemio Kovim-19
2020.3 **Rafael Milhomem**– En Du Muzikaj Universoj
2020.4 **Rogier Huurman** – La plej inter-ret-nacia IJK
2020.5 **Carlos Hernándes** – La Malkongreso

## Movada Rubriko

*raportas Marcionilo Vasconcelos, Redaktoro de Movada Rubriko*

En la jaro 2020, la Movada Rubriko, plian fojon, plenumis sian takson kiel oficiala organo de TEJO ene de la revuo Kontakto. Tio konstateblas pro pluraj kialoj: Unue, oni povas observi, ke en la rubriko ni povas vidi materialon pri novaĵoj de TEJO, por diskutaj temoj kaj por propragandaj tekstoj. Do, tia strukturo estis sekvita en ĉiuj numeroj, ĉar nia celo estis diversigi nian enhavon por ke ĝi estu pli interesa kaj pli utila. Malsupre estas prezento de la eldonoj kaj ĝiaj ĉefaj trajtoj

**2020.1** – En ĝi oni povas trovi prezenton de la nova retejo de TEJO kaj UEA, krom vidi kelkajn tekstojn pri okazigotaj eventoj.

**2020.2** – Cele al alproksimiĝo de TEJO al la publiko de Kontakto, mi aperigis intervjuon kun tiama komitatano de la Organizo. En tiu eldono, la ĉefa karaktero estas tiu diskuto pri la strukturo de TEJO, krom la aperigo de kelkaj novaĵoj pri nia organizo.

**2020.3** – Tiu estis speciala numero, ĉar per ĝi ni povis anonci al niaj legantoj pri la nuligo de ĉeesta IJK. Krom tiu novaĵo, en ĝi troveblas diskuto pri Esperantujo kaj molestado. Tiu estis speciala artikolo kiu montris al ni la forton de nia rubriko kiam ni ricevis tekston de leganto asertante la gravecon de tia temo en nia movado, ĉar li mem iam spertis ion rilate al tiu temo.

**2020.4** – Per tiu eldono ni prezentis la novajn estraranojn de TEJO kaj montris la perspektivon de kelkaj el ili rilate al la venontaj monatoj. Krom tio, komitatano de TEJO ankaŭ prezentis diskut-tekstojn pri la nova epoko de la esperantaj eventoj kiuj devis okazis rete pro la pandemio.

**2020.5** – La antaŭlasta eldono estis plenigita de novaĵo pri TEJO, diskut-teksto pri handkapismo kaj Esperantujo, krom disvastiga enhavo pri la kanalo Scivolemo.

**2020.6** – La lasta eldono pritraktis temon rilatan al la "Ismoj" kiuj konsistas nian movadon. En ĝi ankaŭ ĉeestis tekston pri la esperanta vivsperto de eksa prezidanto de UEA, krom novaĵoj.

Fine oni povas konstati, ke la Movada Rubriko provis riĉigi la revuon per kontribuoj de Esperantistoj el diversaj mondo-partoj, kiuj donis opiniojn, raportis pri novaĵoj kaj videbligis la buntecon de nia movado.

### TEJO-aktuale

*raportas Karina Oliveira, Estrarano (2019-2021)*

De januaro ĝis julio la tasko pri la bulteno estis plenumita de la volontulo Afroditi Konstantopoulou. En aŭgusto ĝi ne aperis, kaj ekde septembro ĝi estis preparita de Quentin Auduc.

# Projektoj

## Projektoj kun Konsilio de Eŭropo (KdE) (2019-2020)

*raportas Spyros Papadatos, Oficisto pri Eksteraj Rilatoj (2019-2020)*

### 1) Centro de Edukistoj pri Homaj Rajtoj: estu aktoro de ŝanĝo!

La projekto origine estis planita laŭ la suba priskribo, sed ne povis okazi pro la pandemio. Por provi okazigi ĝin denove, post la malvigliĝo de la pandemio, ni povos rekandidatiĝi por la venontaj malfermaj alvokoj de Konsilio de Eŭropo.

Ĉi tiu projekto estas kunfinancata de la Junulara Fako de la Konsilio de Eŭropo kaj estas en la kadro de la programo "Junularo por Demokratio" de la Konsilio de Eŭropo 2020-2021. Ĝi celas subteni kaj/aŭ kunfinancigi naciajn aŭ regionajn projektojn por efektivigo de la Ĉarto de la Konsilio de Eŭropo pri Edukado por Demokratia Civitaneco kaj Homaj Rajtoj (EDC/HRE) per trejnado de trejnistoj kaj multiplikantoj neformalaj. La fokusoj de la subtenataj iniciatoj en 2020 estos subteni junulojn en aliro al iliaj rajtoj kaj rekomendi edukadon por homaj rajtoj kaj demokratio.

TEJO, partnere kun la Slovena Nacia Junulara Konsilio (MSS), sukcese petis kune organizi HRE-nacian trejnan kurson kadre de pli larĝa HRE-projekto funkcionta de marto ĝis novembro 2020. La projekto koncentriĝos sur la regiono de Slovenio kaj najbaraj landoj. La plej esenca parto de la projekto estas trejna kurso okazonta inter la 29-a de septembro kaj la 4-a de oktobro 2020 en Ljubljano, Slovenio kaj trejnonta ĉirkaŭ dudek junular-laboristojn, volontulojn kaj aktivajn gejunulojn bazitajn precipe en Slovenio kaj najbaraj landoj (Aŭstrio, Hungario, Kroatio, Italio). Ĉi tiuj homoj estos trejnitaj por fariĝi HRE-multiplikantoj kaj konsistigi reton kiu liveros sekvajn agadojn de HRE reen al iliaj lokaj socioj. Tiel ni celas plibonigi la ĉeeston de la Konsilio de Eŭropo kaj HRE en ĉi tiu kampo, krei kernon de HRE-multiplikantoj, kaj pliigi la diskonigon kaj ĉeeston de TEJO kaj MSS en la areo.

Ni elektis Slovenion ĉar TEJO ankoraŭ ne havas landan sekcion en tiu lando. Tial ĉi tiu projekto estas bonega okazo por pliigi la videblon de TEJO ene de Slovenio kaj konstrui reton de gejunuloj partnere kun la nacia junulara konsilio tie. La subvencioj monaj por la projekto estas 4.699 eŭroj, rekte administrataj de TEJO.

## 2) X-lingvo: la efiko de seksismo en ĉiutaga komunikado

Tiu ĉi projekto estis financata de la Junulara Fako de la Konsilio de Eŭropo. TEJO sukcese kandidatiĝis por organizi studsesion en la dua duono de 2020. Studsesioj estas internaciaj edukaj junularaj seminarioj, daŭrantaj inter kvar kaj ok tagojn, kiuj kunvenigas membrojn de junularaj organizaĵoj aŭ retoj kaj spertuloj por diskutoj pri specifa temo kondukantaj al konkludoj rilataj al la prioritatoj kaj programoj de la junulara sektoro de la Konsilio de Eŭropo.

La TEJO-studsesio temis pri seksismo kaj parola komunikado/lingvo. Ĝi celis konsciigon pri la efiko de ĉiutaga seksisma lingvo kaj trejnadon de junuloj pri verba seksa perforto kaj diskriminacio. Pro la pandemio kaj la fermitaj hungaraj landlimoj, ni devis transirigi la projekton al interreta formato, kaj havi ĝin nur kiel enkondukon al la temo anstataŭ enprofundiĝo.

Niaj partoprenantoj havis la eblon interŝanĝi opiniojn, sciojn kaj bonajn praktikojn, kaj certigi reciprokan lernadon inter la junaj ĉeestantoj per enkonduko de seksneŭtralaj terminoj uzeblaj en ĉiutaga komunikado. La prepar-teamo estis kunmetita de kvin TEJO-membroj kaj trejnistoj (Paulína Jalakšová, Sasha Murr, Charlotte Scherping Larsson, Valentin Ceretto Bergerat, Spyros Papadatos) kaj unu KdE-trejnisto. La kurso estis disponebligita en Esperanto por estontaj generacioj en somero 2021.

# Talento

*raportas Nicolas Kasolene (Nickson), Komisiito pri Talento (ekde sep. 2020), kaj Euleax de Lima Pereira, Komisiito pri Egaleco (ekde Septembro 2020)*

Post kelkjara paŭzo, Talento reekis sian laboron komence de la estrara mandato 2020-2021, en septembro 2020. Do, la unua tasko de la respondeca estrarano, Klára Ertl, estis serĉi aktivulojn por la komisiono kaj tiel reaktivigi la komisionon mem. Talento entute havis 6 aktivulojn inkluzive de la respondeca estrarano. La unua kunsido okazis la 2an de septembro 2020 por interkonatiĝo, kompreno de la komisiono kaj taskoj, kaj la disdivido de taskoj inter la komisionanoj. La dua kunsido, speciala kunsido kun la siatempaj aktivuloj de Homaj Rimedoj, okazis unu monaton poste, en oktobro. Post la dua kunsido, tri komisionanoj, pro malsamaj kialoj eksiĝis de la grupo. Nur tri aliaj restis aktivaj: la komisiito, la respondeca estrarano kaj unu alia aktivulo, Albert Stalin Garrido, kiu estraraniĝis en decembro 2020. Dum tri monatoj de aktiveco , Talento sukcesis okazigi 4 kunsidojn el kiuj unu estis kun la antaŭaj aktivuloj, kiuj trandonis al ni siajn spertojn kaj donis konsilojn al ni. Dum nia trimonata periodo de aktiviĝo, ni pretigis ĉiujn administraĵojn por la komisiono, reklamis ĝin kaj varbis homojn por la aliaj komisionoj kaj por Talento mem. Ni ankaŭ ricevis diversajn taskojn el ekster la komisiono, interalie la pritraktadon de la kandidatiĝoj por la Volontula Programo de TEJO por decembro 2020. Ni eklaboris pri la Mentora Programo por novaj komisiitoj kaj tiuj kiuj volas starigi Landajn Sekciojn. Tiu programo estos tute preta en januaro 2021. Ĉirkaŭ la reta Komitatkunsido de TEJO, la komisiito pri Talento prizorgis dufoje interkonan retkunvenon por la komitatanoj. Krom tio, ni ekis diversajn laborojn por la varbado por nia propra komisiono kaj por aliaj komisionoj.

Dum KoKu en la 28a de Novembro, estis kunsido de Talento kiam ĝiaj pluraj branĉoj, Talento mem, kaj la interes-grupoj Adoleska Agado kaj Egaleco decidis plifortigi siajn interrilatojn ene de Talento. Tial, kreiĝis superrigarda telegram-grupo kaj almenaŭ po 1 membro de ĉiu subbranĉo partoprenas en la aliaj subbranĉoj, por ke pli efika estu nia kunlaboro.

# Parto 3: Interesgrupoj kaj aliaj servoj

## Adoleska Agado

*raportas Briac Millon (Brijako), Komisiito pri Adoleska Agado*

En la unua semestro de 2020 ne okazis agado pri tio, sed ekde julio/aŭgusto aperis interesitoj.

En aŭgusto kreiĝis telegramgrupo pri adoleska agado de TEJO. Ekde aŭgusto, Briac Millon rolas kiel komisiito pri Adoleska Agado. Ni reaktivigis malnovajn grupojn por Esperantlingvaj adoleskuloj en sociaj retejoj. En septembro, ni havis kunvenon pri Adoleska Agado. Ni kreis formularon pri la situacio de adoleskuloj en la Esperanto-komunumo, kiun ni diskonigis tra la reto en oktobro kaj novembro. En decembro ni kontaktis la organizantojn de JES (Junulara Esperanto-Semajno) por proponi programeron por adoleskuloj dum JES. Ankaŭ en decembro, ni decidis plifortigi niajn rilatojn kun aliaj branĉoj de la komisiono pri Talento.

Ni planas proponi novajn renkontiĝajn eblecojn por adoleskuloj.

Ni planas fari pliajn iniciatojn por videbligi adoleskulojn en la Esperanto-komunumo.

## Egaleco

*raportas Euleax de Lima Pereira, Komisiito pri Egaleco (ekde Septembro 2020), kaj David Ruíz i Sánchez, Komisiito pri branĉo Liberen*

En oktobro 2020 oni okazigis kreadon de novaj subbranĉoj kadre de Egaleco. Sekve la subbranĉoj estas *Genra Egaleco*, *Tutmonda Egaleco*, *Alireblo* kaj *Liberen*.

Dum vakas la posteno, Euleax de Lima Pereira rolis kiel komisiito pri Genra Egaleco. Cyprien Guiya estis komisiito pri Tutmonda Egaleco. Soraya Álvarez estas komisiito pri Alireblo. David Ruiz i Sánchez estas komisiito pri Liberen. Niaj novaj branĉoj estis en decembro 2020 je malsamaj niveloj de disvolviĝo kaj aktiveco, sed ĉiuj havis proprajn telegram-grupon kaj retpoŝtadresojn kaj ĉiuj interesatoj estas bonvenaj en ĉiuj branĉoj de Egaleco. Se vi interesiĝas, scivolas aŭ havas sugeston, demandon, plendon aŭ laŭdon, ne hezitu kontakti nin ĉe egaleco@tejo.org aŭ ĉe adreso de specifa branĉo.

## Genra Egaleco

*raportas Euleax de Lima Pereira, Komisiito pri Egaleco (ekde Septembro 2020), Karina Oliveira, Estrarano (2019-2021), kaj Marc Konijnenberg (Marko), Komitatano A (Nederlando)*

Unu el la agadoj estis daŭrigo de la partneriĝo kun la retejo "*Global Voices*" (https://eo.globalvoices.org/), kiu komenciĝis en 2019, por tradukado en Esperanton de artikoloj kiuj pritraktas temojn rilate al genra egaleco.

En 2020 ni kreis glumarkaron 'Konsentaro' pri konsento, uzebla en la populara tujmesaĝilo Telegram; vi trovos ĝin ĉi tie. Ĝi tradukiĝas al pliaj lingvoj, ekzemple la rusa.

Ni komencis verki artikolojn pri esperantistinoj kiuj ricevis diplomon por elstara agado sed ne havas propran artikolon en Vikipedio.

La posteno de komisiito vakis, kaj dume komisiito pri Egaleco plenumis ĝin.

Ekde Oktobro 2020, ni havis jam kelkajn kunsidojn ene de Genra Egaleco kaj ni faris la parton pri Genra Egaleco en la realigplano por nuna mandato (2020-2021).

Ni organizis programeron pri Genra Egaleco dum la ĉi-jara reta JES.

Ni planis verki opini-artikolon laŭ invito de Libera Folio.

Ni havas tre riĉan kaj interesan dosierujon kreitan de Charlotte Scherping Larsson.

Nia retpoŝto estas genra.egaleco@tejo.org . Ne hezitu kontakti nin por pliaj informoj.

## Tutmonda Egaleco

*raportas Euleax de Lima Pereira, Komisiito pri Egaleco (ekde Septembro 2020)*

Nia retpoŝtadreso estas tutmonda.egaleco@tejo.org. Estas telegram-grupo por Tutmonda Egaleco, kaj en decembro 2020 ankoraŭ ne estis unua kunveno.

## Alireblo

*raportas Euleax de Lima Pereira, Komisiito pri Egaleco (ekde Septembro 2020), kaj Soraya Alvarez, Komisiito pri Alireblo*

Soraya Alvarez estas la komisiito de Alireblo. Oni esploris decembre eblajn datojn kaj horojn por kunsido kaj estis jam planoj por agadoj ene de la realigplano. La branĉo koncernas al temoj kiel alirebleco de handikapaj homoj al la Esperanto-movado kaj kongresoj, kapablismo kaj neŭrodiverseco. Nia retpoŝtadreso estas alireblo@tejo.org .

## Liberen

*raportas David Ruíz i Sánchez, Komisiito pri branĉo Liberen, kaj Euleax de Lima Pereira, Komisiito pri Egaleco (ekde Septembro 2020)*

En oktobro 2020 estis kreita tiu ĉi nova subbranĉo kies celoj estas okupi liberpensulan spacon en kiu Esperantistoj el diversaj mondpartoj kun malsamaj realecoj povas diskuti, debati, kaj disvastigi temojn rilate al sociaj, civilaj kaj politikaj rajtoj; ĝia komisiito estas David Ruíz i Sánchez.

Je la dua duono de decembro 2020 oni okazigis unuan retkunvenon kie oni priparolis la kurson de ĉi tiu *Egaleca* subbranĉo en 2021.

Nia retpoŝtadreso estas [liberen@tejo.org](mailto:liberen@tejo.org).

# Junaj Amikoj de Esperanto

*raportas* Carlos Pesquera Alonso (Karlos'), *Vicprezidanto (2020-2021)*

Post la halto en la laboro la jaron antaŭe la laboro pri Junaj Amikoj de Esperanto ne multe antaŭeniris. La ĉefa kialo estis, ke la retpaĝo kiu kolektis ilin ne plu funkciis.

# Kongresoj

*raportas* Carlos Pesquera Alonso (Karlos'), *Vicprezidanto (2020-2021)*

La komisiono ne funkciis. Neniu montris intereson aliĝi. Unuflanke la teamo de la IJK en Nederlando bone funkciis kaj aŭ ne bezonis helpon, aŭ trovis ĝin per aliaj rimedoj. La teamo ankaŭ mem laboris kiam la IJK devis esti ŝanĝita al reta formato.

Rilate al trovi teamon por IJK 2021, la problemo de la pandemio ŝanĝis ĉion. La korea teamo decidis retiri sin kiel organizanton. La estraro lanĉis alian alvokon kaj ne estis ebloj krom ukrainio, kiu estis elektita.

# Pasporta Servo

*raportas* Carlos Pesquera Alonso (Karlos'), *Vicprezidanto (2020-2021)*

Pro la pandemio la vojaĝoj malkreskis kaj la uzo de tia platformo ne tiom sencis. Tial nenio rimarkinda okazis rilate al Pasporta Servo.

# Edukado, Scienco kaj Kulturo

*raportas Karina Oliveira, Estrarano (2019-2021)*

Estas 4 komisiitoj kaj branĉoj de tiu ĉi grupo:

- Komisiito pri Edukado: Raoni Sousa
- Komisiito pri Scienco: Snehaja Venkatesh
- Komisiito pri Kulturo: Hanso Becklin
- Komisiito pri Universitata Agado: Manuela Burghelea

La grupo pri Universitata Agado estas la nura kiu estis aktiva jam de 2019, kaj en 2020 ni daŭrigis kaj ampleksigis la laboron kaj atingojn de la grupo. Pri Edukado, Scienco kaj Kulturo estis aktivaĵoj de septembro ĝis decembro 2020, ĉar antaŭ tiu periodo ne estis aktivaj estraranoj/komisiitoj por tiuj grupoj. Estas kunlaboro kaj daŭra komunikado inter la 4 komisiitoj de la grupo kaj la respondeca estrarano per grupo kiun ni havas en Telegramo.

# Edukado

*raportas Raoni Sousa, Komisiito pri Edukado*

La priskribo de la interesgrupo estis reformulita cele konformecon al pli vasta ideo de edukado, ne disa de la ĝeneralaj celoj de TEJO. Parte inspirite de tiu ideo mi verkis artikolon por *Kontakto* 2020:6 pri kiel gravas, ke Esperanto-instruado instruu multajn aferojn pri kunvivado en socia diverseco kaj pri kulturo, ideoj kaj historio de Esperanto, tiel ke ĝi estu ne nur Esperanto-parolantigo.

Kiel komisiito mi komencis helpi unu el la oficistoj pri plua Esperanto-lernado, laŭ la peto de estraranoj. Tamen la daŭrigo de tiu tasko iĝis neebla pro hazardaj cirkonstancoj unue ĉe li kaj poste ĉe mi, tiel ke la afero estas replanata.

Nova Telegram-grupo estis starigita, ĉar al la antaŭa jam ekzistanta mankis administranto. Al ĝi estis invititaj interalie homoj esprimintaj intereson en antaŭaj jaroj, kies nomoj estis trovitaj en registroj, kiujn Karina Oliveira sendis al mi. En tiu grupo oni komentas novaĵojn pri la temo, proponas aktivaĵojn, interŝanĝas ideojn kaj spertojn. Ĝia aktiveco tamen estas ankoraŭ malofta.

# Scienco

*raportas Snehaja Venkatesh, Komisiito pri Scienco*

La interesgrupo pri Scienco estas sub la komisiono pri Edukado Scienco kaj Kulturo.

Ĉi tiu branĉo ekzistas por ke sciencemaj kaj fakemaj junuloj povu kuniĝi kaj agi laŭ sia studo/profesio en Esperanto. La grupo estis kreita je fino de Aŭgusto. Nia unua paŝo estis krei telegram-grupon kaj ni havis malferman alvokon por la video "Esperanto kaj Scienco". Tiel ni planis ne nur varbi/ informi Esperantujon pri la kreado de nova grupo pri Scienco en TEJO, sed ankaŭ por kunigi homojn kaj kuraĝigi ilin por sciencumi per Esperanto. 12 homoj kontibuis por la unua epizodo kaj post ĝia granda sukceso, la dua epizodo kun 9 kontribuoj.

La grupo ankaŭ varbis pri la reta KAEST kaj kelkaj anoj de la grupo ne nur partoprenis sed eĉ prelegis dum la reta KAEST.

Ni komencis la konversacion pri revivigo de ISAE kaj esperеble dum la venonta jaro estos fruktodona kunlaboro. Nun la grupo okupiĝas pri la organizado de prelegserioj ĉiumonate.

1. 24a Oktobro 2020 : La temo estis Ĥemio , prelegis Francesco Fagnani kaj Frank Van Hertrooij.
2. 21a Novembro 2020 : La temo estis Fiziko , prelegis Mark Wootton kaj Abhinav Varma.
3. 19a Decembro 2020 : La temo estis Astronomio , prelegis Amri Wandel kaj Jana Suna

Fine de la jaro kun la grupo pri Universitata Agado ni planis organizi la retan simpozion IRIS kio okazos dum la nova reta evento de TEJO Retoso de la2a ĝis la5a Aprilo 2021.

# Kulturo

*raportas Hans Becklin (Hanso), Komisiito pri Kulturo*

Post multaj stagnaj jaroj, la branĉo pri kulturo denove ekfunkciis en Septembro 2020. La plej grava atingo de la branĉo dum ĉi tiu stumpa jaro estis varbi membrojn por ĝia agado. Post la starigo de grupo en Telegramo, homoj komencis aliĝi, poste ili timide komencis babili pri kulturo kaj eĉ proponi interesajn temojn kulturligitajn.

La unua konkreta agado, komencita laŭ nia laborplano por la koncerna mandato, estis la starigo de legorondo jam delonge dezirata kadre de TEJO. Aliĝis dum la jaro ĉirkaŭ 25 homoj de ĉiuj kontinentoj krom Aŭstralio/Oceanio kaj Antarkto. En 2020 ni kunsidis du fojojn por priparoli la verkojn *Fajro sentas mi interne* kaj *La stranga butiko* en Novembro kaj Decembro respektive. Averaĝe, partoprenis la rondon kvin homoj, ne ĉiam la samaj. Kvankam tiom malgranda ĉeestantaro ne estas ideala, ĝi donas intiman etoson kaj paroleblon al ĉiuj, ne nur al la plej vortsputemaj.

Interesiĝo kaj aliĝoj daŭre kreskis dum la lasta sesono de la jaro, kaj tiuj, kiuj jam unu fojojn partoprenis ĝenerale partoprenis denove—bona aŭguro por ankoraŭ pligrandiĝanta programo de TEJO. La partoprenantoj ne konsistas nur el spertaj legantoj de la Esperanto-literaturo, kiuj utiligas la legorondon kiel malgrandan parton de la normala legado sed plimulte el fluaj parolantoj, kiuj malofte legas kaj scias malmulton pri la literaturo kaj kulturo de Esperantujo kaj volas kleriĝi pri ĝi. Ofte ili unue aŭdas pri la legorondo de iu konato aŭ samklubano, kiu informiĝis pro la diversmaniera reklamado, plej ofte la intervjuo de la komisiito aperinta la 10-an de decembro 2020 en *Libera Folio*. Oni ne subtaksu la valoron de informado ekster la ĉefa fluo de TEJO-agado kaj reklamado.

La legorondo estis tre taŭga projekto por komenci la restarigon de la branĉo, precipe ĉar ĝi estis reklamita bone kaj vaste. Multaj homoj neniam aliĝintaj aŭ partoprenintaj laŭdis TEJOn en sociaj retejoj pro la konkreta kultura agado. Aliaj eksciis pri la resurekto de la branĉo per la varbado por la legorondo kaj, manke de intereso pri tiu parto de la agado, tamen aliĝis al la grupoj en Telegramo aŭ almenaŭ eksciis, ke TEJO okupiĝas serioze pri kulturo.

La laboro de la komisiono daŭris ĝis la lastaj tagoj de la jaroj, kaj fine de la jaro aperis en *Kontakto* kiel la ĉefartikolo eseo verkita de la komisiito por enkonduki kulturon kiel vastan kaj diskutendan temon al la juna esperantistaro. La reagojn oni rikoltos, laŭ la laborplano, komence de 2021.

## Universitata Agado

*raportas Manuela Burghelea,* Komisiito pri Universitata Agado

La grupo pri Universitata Agado iĝis branĉo de la Komisiono pri Edukado, Scienco kaj Kulturo en la komenco de la mandato de la nova estraro. Antaŭ mia transpreno de la komisiiteco, la grupo, kreita en Telegramo, estis jam aktiva kaj bone funkcianta. Ĝin kunordigis kvaropo da TEJO-anoj, kiuj estas daŭre kunlaborantoj.

Per konsultiĝo kun la membroj de nia grupo okazinta fine de aŭgusto, ni kolektis kelkajn ideojn por realigi dum la jaro, inkluzive de reta kunlabora simpozio, esperantologiaj diskutoj, enkonduko al Esperanto por studentoj, kontaktigado de universitataj kluboj.

En oktobro kaj novembro, ni organizis la kreadon de la video Esploristoj pri Esperanto kaj sekvan koncernan retan renkontiĝon.

Je la fino de 2020, aperis nova fokuso de nia laboro, nome organizado de simpozio. La Internacia Reta Interfaka Simpozio (IRIS) okazos kadre de Retoso, en aprilo 2021, kaj enhavos publikigadon de videoj kaj paneldiskutojn pri matematiko, fiziko, informatiko, biologio, kemio, medicino, geosciencoj, inĝenierarto, psikologio, edukado, lingvistiko, antropologio, sociologio, historio kaj artoj.

Mi laŭeble partoprenis ankaŭ la monatan Kunpensigadon pri Esperanto kaj Universitatoj organizitan de UEA-anoj, peris diversajn artikolojn de ESF al nia grupo, kaj kunlaboris kun la aliaj komisiitoj ene de la komisiono pri Edukado, Scienco kaj Kulturo, ekzemple pri varbado aŭ partoprenado en renkontiĝoj.

## Malaktivaj komisionoj kaj laborgrupoj

Rilate al la Kovim-19-pandemio, la komisiono pri Moviĝebloj ne ekzistis dum 2020.

# Apendico

## Kromnomoj de personaj nomoj

| | |
|---|---|
| Ariel Palmer | Giorgio Nikolov |
| Brijako | Briac Millon |
| Feliĉa | Mung Bui |
| Ĝojo | Hoan Tran |
| Hanso | Hans Eric Becklin |
| Karlos' | Carlos Pesquera Alonso |
| Marko | Marc Konijnenberg |
| Nickson | Nicolas Kasolene |
| Roĉjo | Rogier Huurman |
| Sasha Murr | Oleksandra Kovyazina |
| Tuŝka | Konstanze Schönfeld |

## Mallongigoj de nomoj de organizoj kaj organoj

| | |
|---|---|
| **CO** | Centra Oficejo de UEA/TEJO (Roterdamo) |
| **EACEA** | Education, Audiovisual and Culture Executive Agency (*Eduka, Aŭdvida kaj Kultura Plenuma Agentejo* de EU) |
| **EESC** | Eŭropa Socio kaj Ekonomia Komitato |
| **E@I** | Edukado@Interreto, Esperanta organizo en Slovakio https://ikso.net/eo/ |
| **EKC** | Esperanto Kultur-Centro de Tuluzo (Francio) |
| **EKOSOK** | EKOnomia kaj SOcia Konsilio de Unuiĝintaj Nacioj |
| **ESK** | Eŭropa Solidara Korpuso, la nova volontula servo |

| | |
|---|---|
| **EsKu** | Estrarkunsido |
| **EU** | Eŭropa Unio |
| **EVS** | Eŭropa Volontula Servo, nova versio: ESK (Eŭropa Solidareca Korpuso) |
| **EYE** | *European Youth Event*<br>(Eŭropa Junulara Evento) |
| **FEJ** | Filipina Esperanto-Junularo |
| **FoJE** | Forumo Junulara Eŭropa |
| **GEJ** | Germana Esperanto-Junularo |
| **IJK** | Internacia Junulara Kongreso |
| **IKRJO/ ICMYO** | Internacia Kunordig-Renkontiĝo de Junularaj Organizoj<br>*International Coordination Meeting of Youth Organisations* |
| **ISAE** | Internacia Scienca Asocio Esperanta |
| **JES** | Junulara Esperanto-Semajno |
| **JOTE** | Junulara Organizo de Togolandaj Esperantistoj |
| **KAEST** | Konferenco pri Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko |
| **KdE** | Konsilio de Eŭropo |
| **KER** | Komisiono pri Eksteraj Rilatoj |
| **KODEJO** | KOmpleta Demandaro por Esperantaj Junularaj Organizoj |
| **KoKu** | Komitatkunsido |
| **MSS** | Slovena Nacia Junulara Konsilio |
| **SKEJ** | SlovaKia Esperanto Junularo |
| **TEJO** | Tutmonda Esperantista Junulara Organizo |
| **UEA** | Universala Esperanto-Asocio |
| **UK** | Universala Kongreso |

| | |
|---|---|
| **UNITED** | *UNITED for Intercultural Action*<br>(Unuiĝintaj por Interkultura Agado) |
| **UNOY** | *United Network of Young Peacebuilders*<br>(Unuiĝinta Reto de Junaj Pacokonstruantoj) |